

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 623 (10)

Oktobro 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)



La partoprenantoj de Somera Pedagogia Semajno en
Kranjska Gora, Slovenio, Jugoslavio (Vd. p. 147).

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi
respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon
(vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.).

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por
ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chia-
brera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario,
77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fille-
brook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj
aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj
asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-
Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

Iom pri informado	145
La momento por ekinstrui	145
Kulturaj internaciaj ferioj	146
Antaŭkongreso de Parizo	147
Somera pedagogia semajno	147
La tera sano. <i>Eve Balfour</i>	148
Letero al William Aud. <i>K. Kalocsay</i>	152
<i>Rubrikoj</i>	
CED	151

Tra la mondo	154
Esperantista vivo	155
La juna vivo	156
Niaj konkursoj	158
Koresponda servo mondskala	158
Ŝaka rubriko	159
Nekrologo	160
Oficiala informilo	160
Internaciaj konkursoj	kovrilo 3

IOM PRI INFORMADO

Ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas?

Tio estas demando, kiun ofte starigas al mi mirigitaj renkontitoj, kiam mi mencias nian lingvon. Tiu publika neinformiteco estas rekta kritiko pri la ĝisnuna amplekso de nia informado. Per la tabelo eldonita en nia juli-aŭgusta kajero, oni povas konstati, ke nia informservo kreskas. Sed ankoraŭ multo estas farenda; ni ne povas esperi favoran publikan sintenon al nia afero, se granda parto de la publiko ne havas motivon kaj okazon formi iun ajn sintenon, pro manko de informoj pri la Internacia Lingvo — por ne paroli pri sinteno formita laŭ **malĝustaj** informoj!

Ke oni povas, per konscienca kaj daŭra laboro, vere multon atingi, tion oni konstatas laŭ la sukceso de la bonege organizita Gazetara Servo okaze de la 42a U.K. en Marseille, kiun ni jam menciis en nia septembra numero. Mi havas antaŭ mi statistikon pri la rezultoj de la Gazetara Servo **antaŭ** la Kongreso. Per ĝi oni vidas, kiom estas farebla. Inter la 1-a de januaro kaj la 20a de junio, 1957, 780 informoj aperis en la franca gazetaro, el kiuj 608 koncernis Esperanton ĝenerale kaj 172 la kongreson mem. Ĝis la 20a de julio, la Kongresa Gazetara Servo dissendis 3 komunikojn kaj triteman raporton okaze de la Gazetara Konferenco en Parizo. Reto da esperantistaj kunlaborantoj en 33 urboj surloke agadis ĉiufoje por la publikigo de la komunikoj. La rezulta cifero de la detala statistiko montras, ke tiuj artikoloj aperis 183 fojojn, kun suma spacamplekso de 8,906 cm². La 183 eldonoj okazis en 85 gazetoj de 71 urboj. Oni kalkulas, ke minimume 10,500,000 personoj legis pri la kongreso ĝis la 20a de julio.

Prave la raportintoj konkludas: „La supraj statistikoj devus esti studmaterialo por la gvidantoj de la landa movado”. En kelkaj landoj la informado estas relative kontentiga, en aliaj — ĝi ne estas. Kaj tamen tiu laboro estas vere gravega. Por atingi sentebajn rezultojn, necesas ĉefe celkonscia kaj daŭra sindono. En Nederlando, post la U.K., mi havis okazon admiri la agadon de la nova gvidanto de la nederlanda informservo, kaj mi estas certa, ke tre baldaŭ li povos vidi la rezultojn de sia laboro. Aliaj landoj bonvolu kopii!

Dum la Kongreso mem, la gazetaro vaste raportis pri ĝi. Provizora takso, surbaze de la eltondaĵoj ricevita de specialigita oficejo, montras ke la kongresaj bultenoj aperis en Francujo minimume en 20 milionoj da gazet-ekzempleroj. Speciale senditaj ĵurnalistoj venis el Parizo („Le Figaro Littéraire”, la plej grava literatura gazeto en Francujo), el Italujo („La Stampa”, la dua laŭvice taggazeto) kaj Britujo („Truth Magazine”, periodaĵo kun kelkmiliona eldonkvanto). Kvankam la meza amplekso de franca gazeto estas ok paĝoj, la gazetoj en Marseille dediĉis kvaronpaĝon al objektivaj kaj ilustritaj raportoj, akcentante la gravajn programojn kaj la kulturajn manifestaciojn. Notinda estas la vorto „objektivaj”. Estas vere, ke eĉ ne unu el tiuj gazetoj mokis nian aferon; kontraŭe, ĉiu senescepte estis objektiva.

Ne necesas diri, ke ne ĉiam nia afero ricevis tian honestan traktadon... Sed kompreneble por trafi oni devas ankaŭ pafi; nia municio estas la diversaj kulturaj aranĝoj de la esperantistoj: ne nur la U.K. mem, kun ĝia I.S.U. kaj Belartaj Konkursoj, sed ankaŭ la Kulturaj Internaciaj Ferioj en Grésillon, la Somera Pedagogia Semajno en Kranjska Gora kaj la 13a Internacia Junular-Kunveno en Villeneuve-lez-Avignon, pri kiuj oni povas legi detalajn raportojn en tiu ĉi numero de „Esperanto”. La kultura nivelo de niaj aranĝoj altiĝas ĉiujare, kaj la rezultoj de tio ĉe la publiko komencas sentiĝi.

Kiu bone pafas per tiu municio, bone trafas por Esperanto.

William Auld.

LA MOMENTO POR EKinSTRUi

Plurfoje estis dirite, ke la tuta agado de la organizita Esperanto-Movado konsistas el tri ĉefaj branĉoj: informado, instruado, praktikaj aplikoj. Ne estas malutile ankoraŭfoje akcenti, ke neniu el la tri sufiĉas per si mem. Nur bone pripensita kaj planita kunligo kondukas al la celo: plia disvastigo de la lingvo.

Komence de la nova laborsezono la atento devas esti unuavice centrigita al la instruado. Tiu gravega tasko apartenas ĉefe al niaj lokaj societoj. Ju pli bona estis kaj estas la informado, des pli favora estas la ĝenerala agordo rilate la Internacian Lingvon kaj, sekve, des pli efika la laboro sur la kampo de instruado.

En kelkaj landoj — precipe en tiuj, kie la disvastigo de la lingvo estis malhelpata aŭ eĉ malebligita dum pluraj jaroj — celtrafa informado donas eksterordinarajn rezultojn eĉ sen speciala klopodo direktita al instruado. En Pollando ekzemple, disvendiĝis en la pasinta jaro 30.000 lernolibroj, dum la unua postmilita lernolibro por ruslingvanoj de N. D. Andrejev, ĵus publikigita en Leningrad, eldoniĝis en 95.000 ekzempleroj, kiuj estas amase aĉetataj.

En aliaj landoj, tamen, estas necese tre sisteme instigadi al la lernado kaj daŭre ebligadi ĝin. Ĉiu landa asocio devus organizi konstantan korespondan kurson, se tia ankoraŭ ne ekzistas, kaj vaste diskonigi tiun lerneblecon. Ĉiu loka organizaĵo nepre malfermu almenaŭ unu kurson por komencantoj. Se iel eble, oni dividu la lernantojn en plurajn klasojn laŭ iliaj kapabloj lerni la lingvon pli aŭ malpli rapide. La instruadon oni transdonu nur al la plej kvalifikitaj personoj. Ankaŭ la unuopuloj povas multe helpi ĉu instigante siajn gekonatojn al la lernado, ĉu instruante mem en malgrandaj rondoj, eĉ en siaj hejmoj.

Per iom da bona volo estas eble, eĉ ne malfacile, duobligi la nombron de esperantistoj en unu jaro. Ĉiu kontribuu al tiu celo laŭ siaj eblecoj!

I. L.

Kulturaj Internaciaj Ferioj



Kastelo de Grésillon

Verŝajne la sola esperantista tereno en la mondo estas la Kastelo kaj bieno de Grésillon, apud Baugé (M et L), Francujo. Ĉiuokaze, ne povas ekzisti tereno, kiu estas pli esperantiste esperantista ol tiu bela, agrabla Kulturdomo, amata posedaĵo de kuraĝa kooperativo de francaj esperantistoj, kiuj dediĉas sian tempon kaj sian monon por krei centron je dispono de la tutmonda samideanaro! Antaŭ nuraj kvin jaroj, ĝi estis malnova, malm moderna, senkomforta malplenaĵo; hodiaŭ ĝi estas varma kaj vivanta, kaj enhavas ĉion necesan por la normala komforto de siaj vizitantoj. Antaŭ kvin jaroj, oni disponis en la tuta domo pri unu sola krano por malvarma akvo, oni lumigis per ole-lampoj, kaj la necesejoj estis — nu, prefere ne paroli pri tio. Hodiaŭ ĉiu ĉambro havas fluantan akvon, la tuta kastelo estas elektre lumigata, la vizitantoj disponas pri naĝejo kaj pilkludejo, kaj la necesejoj estas tute normalaj kaj modernaj — kaj ĉio ĉi dank' al la sindona laboro de tiuj francaj esperantistoj, kiuj mem plenumis ĉion per propraj manoj kaj propra laboro.

Se la leganto opinias, ke mi tro detale pritraktas la aferon, li mem iru kaj miru! La eksterlanda vizitanto, kiu en la komenco pensas pri la Kulturdomo kiel „ili“, trovas post kelkaj tagoj, ke li jam pensas pri „ni“. Tio rezultiĝas de la vera sento, troviĝi en ia Esperantujo, troviĝi hejme, kiun kreas la bela etoso de tiu loko kaj ĝiaj kuratoroj, ges-roj Micard. La Kulturdomo ne estas hotelo, sed hejmo; tie oni ne estas gasto, sed familiano.

Sur tiu vere esperantista tereno okazis, de la 14a ĝis la 24a de julio, la Kulturaj Internaciaj Ferioj, sub aŭspicioj de UEA. Kvindek samideanoj el dek

landoj tien venis por partopreni kulturen aranĝon sub la titolo „Kulturoj kaj civilizoj de la mondo“. Ne povas ekzisti dubo pri la grandioza sukceso, laŭ ĉiuj vidpunktoj, de tiu aranĝo; la vere plena programo vekis la entuziasmon de ĉiu partoprenanto, kaj dum la Ferioj kreiĝis nerompebla amikeco kaj kamaradeco de la tuta grupo.


La programo dividiĝis en tri ĉefajn partojn kun komuna fadeneto de la elektita ĝenerala temo: prelegoj, diskutoj kaj kulturaj ekskursoj.

Sub la titolo „Kulturoj kaj civilizoj de la mondo“, kvin prelegantoj prezentis diversajn vidpunktojn, kiuj tamen montriĝis en la fino nur diversaj facetoj de komuna temo; ĉio kune donis kvazaŭ sintezon de diversaj vidpunktoj kaj superrigardon tra la tuta civilizo kaj ties

problemoj. Prof. D-ro Ivo Lapenna havis kiel temon „La laboro de Unesko por interkonigo de popoloj“, sed kompreneble liaj kleraj kaj streĉe interesaj prelegoj trapaŝis multe pli vastan kadron. Mag. William Auld prelegis pri „Toynbee kaj la vivo de la civilizacioj“, uzante la historian teorion de la anglo Toynbee kiel elirpunkton por pritrakto de la ebleco trovi ripetigantajn desegnojn en la longa historio de la homaro. Prof. Gaston Waringhien prenis unu civilizacion kaj detale analizis ĝian kreskadon sub titolo „La evoluo de la Loire civilizacio“; ĉar Gresillon troviĝas en tiu regiono, kaj dum la ekskursoj oni havis okazon pli intime konatiĝi kun la regiono, tiu temo estis aparte taŭga. D-ro André Albault elektis la temon „Populaciaj problemoj kaj ilia rilato al la kultura vivo de la popoloj“, kaj li bonege prilumis la speciale gravan influon, ne nur de la amplekso de la populacio (kun la rezultantaj problemoj pri nutrado, laborkapablo, ktp), sed ankaŭ de kelkaj apartaj faktoroj kiel la malsanoj kaj la alkoholismo, sur la civilizaj eblecoj. Ing. R. Watier brile pritraktis la influon de la tekniko kaj ĝiaj materialaj atingoj precipe por nia civilizacio de la 20a jarcento; sub titolo „De la XVIa jarcento ĝis la aŭtomatigita civilizacio“ li skizis la evoluon de la tekniko, kaj konkludis per kelkaj pensigaj aŭguroj pri la estonteco de nia civilizacio rezulte de la plej novaj atingoj sur tiu kampo.

En kunligo kun tiu serio de prelegoj okazis alia serio pri „Problemoj de la Esperanto-movado“, kaj sub tiu titolo ĉiu preleganto detale pritraktis unu aspekton de nia movado. Pri tiuj problemoj, kiel ankaŭ pri la civilizacioj, okazis viglaj diskutoj, kiujn partoprenis la tuta ĉeestantaro, kaj ĉiu multe profitis el la libera interŝanĝo de ideoj.

Ekskursoj estis aranĝitaj, kiel tage tiel nokte, al la belaj kaj historie interesaj kasteloj de la Loire-valo, kaj ankaŭ, laŭ invito de la loka grupo, al Angers. Dum la vesperoj oni ĝuis filmojn (ĉar ankaŭ



La Esperantista kulturdomo

filmaparaton posedas la Kastelo), dancon kaj diversajn gajaĵojn.

Oni devas tute aparte mencii la grandan meriton de Prof. Waringhien dum la ekskursoj; li bonege tradukis la klarigojn de la diversaj gvidistoj, aldonante mem multajn detalojn al la rutinaj klarigoj. La efiko sur la ĉeestanta neesperantista publiko estis impresa kaj rimark- ebla.

Multaj gejunuloj partoprenis la Kulturan Ferion, kaj en unu vespero ili prezentis la dramon „La malamiko” de Bojidar Trudic. Malgraŭ la mallonga preparado, ili heroe venkis ĉiujn malfacilaĵojn kaj vere plezurigis siajn aŭskultantojn. (D-ro Roelofs pardonos al mi, ke mi inkluzivas lin inter la junuloj; unu rolo ja postulis — malplijunulon!)

Notinde estas, ke ĉiu el la kvin prelegantoj registris unu sian prelegon por la nove fondita Sonbenda Servo de UEA; tiel ĉiuj grupoj kaj individuaj esperantistoj povos profiti el la laboroj de la kultura aranĝo.

Inĝ. Watier, s-ro Micard kaj iliaj helpantoj meritas la sinceran kaj varman dankon de la partoprenintoj por la modela aranĝo de la dektaga ferio kaj de la mastrumaj detaloj. Estas grandparte pro iliaj zorgoj, ke kun io pli profunda ol formala atento oni aŭskultis, dum la fermaj momentoj de tiu neforgesebla sperto, al tiu ĉi salutpoemeto de Prof. Waringhien:

Adiaŭas la semajno
per lasta pluvokis'.
Ni ankoraŭ kune sidas,
kaj morgaŭ estos dis.

Sed la ĝoj' de tiuj tagoj
ne tuta velkos for.
Ian riĉon ni kunportos
ŝirmitan en la kor':

Ekbruligis nia rondo
la fajron de l' esper';
Nun dividu ĝin kaj iru
ni, ĉiu kun fajrer'.

Ke en ĉiuj niaj landoj
ni ĝin reblovu jam
kaj dormantan mondon veku
per hel' de nia flam'!

Mi estas certa, ke ĉiu partopreninto plej kore subtenos min, se mi finos per duobla rekomendo: al la tutmonda esperantistaro mi plej fervore rekomendas la kulturajn aranĝojn de UEA, kaj la restadon en nia Esperantista Kulturdomo. Neniu bedaŭros sian aliĝon al unu aŭ al ambaŭ.

J. M.

ANTAŬKONGRESO DE PARIZO

Tiu manifestacio, kiu kunvenigis samtempe samideanojn irantajn al la Internacia Kongreso de Marseille kaj reprezentantojn de la popoluniversitatoj, okazis la 31-an de Julio kaj la 1-an kaj 2-an de Aŭgusto ĉe la UNESKO-Palaco.

Entute 145 personoj de 22 landoj ĉeestis kaj multaj el ili laboris dum 2 tagoj ĉe 3 komisionoj. La rezolucioj pravas ke,

kvankam neniam antaŭe okazis internacia renkonto de la Popoluniversitatoj, estas vera bezono por la estonteco de tiuj kulturaj asocioj.

Merkrede matene, la prezidanto Pierre PETIT bonvenigis la kongresanojn kaj prezentis al la ĉeestantoj la francan ministron Jacques BORDENEUVE, kiu plej agrable akcentis la gravecon de nia kongreso.

Poste, S-ro S. A. STAHERE, estro de la fako „Eduko de la plenaĝuloj” ĉe UNESKO, kaj D-ro WEILENMANN, prezidanto de la eŭropaj Popoluniversitatoj, salutis la kongresanojn.

Je la 6-a horo vespere okazis tre brila simfonia koncerto de la muzikistaro de la nacia radio-orkestro, kies programo estis tute franca, kun la komponistoj RAMEAU, Gabriel FAURE, kaj Maurice RAVEL. Ĝi estis vera ĝuo por la ĉeestantoj.

Post la vespermanĝo estis varietea spektaklo kun diversaj artistoj kaj FLEGO, nia internacia artisto, kiu kantis diverslandajn kantojn.

Ĵaŭde okazis Oficiala Akcepto en la Pariza Urbdomo de S-ro Marcel LEVEQUE, Prezidanto de la Urba Konsilantaro. Poste estis ekskurso sursipe sur la rivero Seine.

Je la 18.30 estis oficiala akcepto de malgranda delegacio ĉe la Ministerio pri Artoj kaj Beletro, Palais-Royal. Vespere, okazis nokta vizito al Parizo kaj ankaŭ kelkaj vizitoj al muzeoj kaj lumigitaj vidindaĵoj. Je meznokto, vizito al Montmartre.

Vendrede okazis tuttaga vizito al Versailles.

LA SOMERA PEDAGOGIA SEMAJNO EN KRANJSKA GORA (Jugoslavio) DONIS FRUKTODONAJN REZULTOJN

Sub aŭspicio de Jugoslavia Nacia UNESKO-komisiono la Jugoslavia Esperanto-Federacio aranĝis de la 26-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Kranjska Gora apud Jesenice Someran Pedagogian Semajnon, kiun vizitis 90 instruantoj kaj profesoroj instruantoj Esperanton en la lernejoj kaj kelkaj alilandaj gastoj. La prelegantoj estis ne sole hejmuloj sed ankaŭ alilandaj eminentaj fakuloj (Doc. S. Pragano, D-ro Stöp-Bowitz, D-ro P. Neergaard).

Dum antaŭtagmezaj horoj okazis prelegoj pri diversaj aktualaj temoj, kaj posttagmeze sekvis diskutado laŭ grupoj. Vespere estis prezentataj kulturaj kaj amuzaj programoj. Pri metodiko en instruado de Esperanto en lernejoj prelegis akademiano Prof. Rudolf Rakuša; pri la principoj de rekta metodo kaj pri instruado de historio en diversaj landoj Doc. S. Pragano. Pri mnemoniko en instruado de la Internacia Lingvo parolis Steven V. Stojnič. Modernajn teknikajn helpilojn en instruado de la lingvo prezentis Dragica Zalar. Pri edukaj celadoj en instruado de Esperanto parolis Peter

Zlatnar, kaj pri rasaj antaŭjuĝoj akademiano D-ro Stöp-Bowitz. Pri literaturo kiel eduka rimedo parolis akademiano Ivo Rotkvič; pri popularscienca literaturo kiel kompletiga legaĵo akademiano D-ro Paul Neergaard, kaj pri eksterlerneja aktiveco de lernantoj Peter Vukomanovic.

En tute kamaradeca kaj labora atmosfero la partoprenantoj de la seminario prezentis kaj pridiskutis la novajn sociajn devojn kiujn ili transprenis enkondukante la Internacian Lingvon en la lernejoj, kaj precipe estis pridiskutita la demando kiamaniere enkonduki Esperanton kiel bazan lingvon en la IV-a klaso de eksperimentaj elementaj lernejoj. Oni trovis kiel plej taŭge komenci la lernojaron per 3-monata rektmetoda kurso laŭ Cseh, adaptita por infanoj, kaj fini per prezento de elementa gramatiko kun akompano de taŭga legaĵo, kiu aperu en aparta porinfana monata gazeto.

Oni montris la neceson alproksimigi la literaturon al la infanoj, kaj precipe la malpli konatan literaturon de malgrandaj popoloj, kaj krei fundamentan stokon de elektitaj Esperantaj libroj en infanaj bibliotekoj. Oni decidis prezenti rezolucion pri progresigo de Esperanta popularscienca literaturo al UEA, kiu dum la U.K. en Mainz kreu apartan sekcion kiu pritraktu la aferon, en konjekto kun enkonduko de Esperanto en la lernejoj.

Konforme al reformata lernejo oni substreki la neceson, ke instruantoj instigu ankaŭ al diversmaniera kaj diversvoja eksterlerneja aktiveco, kaj ke la rezultoj estu diskonigitaj ne sole al lernantoj sed ankaŭ al lernejoj instancoj kaj gepatroj per jarfinaj ekspozicioj, infana gazeto k.s. La aranĝantoj decidis eldoni la tutan materialon seminarian en formo de aparta libro. Ĉe la fino estis akceptitaj rezolucioj pri instrumentado, lernolibroj kaj gvidiloj en eduka laboro, kaj senditaj saluttelegramoj al Marŝalo Tito, Nacia UNESKO-komisiono kaj Konsilio por Klerigo kaj Kulturo de FPR Jugoslavio.



S-ro Honoré Bourdelon, simpatia prezidinto de la LKK por la 42a Universala Kongreso en Marseille, kies personeco kaj kapabloj vaste kontribuis al la agrableco kaj sukceso de tiu manifestacio, sin turnas nun al ĉefaj kampoj de la por-esperanta laboro. Kiel konata spertulo pri provenca lingvo kaj kulturo, li dediĉas sin al tradukado de unu el la ĉefaj verkoj de la granda provenca poeto Mistral.

LA TERA SANO

Antaŭdiro pri Venonta Ŝanĝo en la Direkto de la Agrikultura Scienco

De Eve Balfour

„Oni praktikas la arton de la terkuracado kun viglo sed la scienco de la tera sano ankoraŭ ne naskiĝis”. — Aldo Leopold.

Scienco estas la nomo kiun oni donis al la homa interpretado de observitaj fenomenoj, kiam la observaĵoj estas registritaj laŭ iuj akceptitaj reguloj. Scienca eltrovo alvenas laŭ du vojoj: aŭ per longa kaj zorgoplena observado kaj registrado de ofte ripetitaj naturaj okazajoj, aŭ per antaŭa starigo de demando kaj posta kreo de ripeteblaj kaj kontroleblaj eksperimentoj ĝis oni ricevas respondon. Per unu aŭ alia el tiuj du metodoj, aŭ per kombino de ambaŭ, oni deduktis ĉiujn „regulojn” de kaŭzo kaj rezulto, evoluigis ĉiujn „naturajn leĝojn” kaj konstatis ĉiujn sciencajn „faktojn”.

Kelkminuta konsidero nepre konvinkas, ke sekve troviĝas en ĉiuj sciencoj almenaŭ tri elirejoj por eraroj.

Unue, la reguloj postulas, ke ‘scienca’ observado limiĝu al tiuj fenomenoj kiujn oni povas konstati per la kvin sensoj, kaj pro tio tutaj aferoj de kaŭzado povas esti ellasitaj el la rezultaj kalkuloj kaj deduktoj, ĉar la realo tute ne limiĝas al tiel mallarĝa kampo. Due, la homa tendenco rimarki nur tiujn aferojn kiujn oni serĉas ofte kaŭzas, ke oni ne observas ŝajne senrilatajn, sed eventuale gravajn, faktorojn en donita situacio, kaj trie, en la eksperimenta metodo manko fari la ĝustan demandon povas konduki al tute trompa respondo.

Per ĉi tio ni volas, ne mallaŭdi la valoron de la scienco, sed nur esprimi bedaŭron pri la sinteno, kiun oni trovas tro ofte inter sciencaj teknikistoj kaj instruistoj en ĉiuj epokoj (tamen, kompreneble, ne en la vicoj de la plej altgradaj esploraj sciencistoj), ke la ‘scienca’ dogmismo kiu apartenas al ilia epoko estas senerara kaj neŝanĝebla. Ĝi estas sinteno tiom pli surpriza pro tio, ke la tuta historio de la scienco montras, ke ĝi havas la karakteron de konstanta ŝanĝo. La vojo de la scienco estas kovrita de forĵetitaj dogmoj.

Kiam oni provas diskuti tiel polemikan aŭ disputeblan demandon kiel tiu pri la tera sano, aparte en ĝia rilato al la ape-

rado de domaĝuloj kaj malsanoj ĉe plantoj kaj bestoj, estas konsilinde memori la suprajn faktojn, precipe la tri eblojn de eraro, ĉar la normala fragmenteca esploro estas pli ol kutime tuŝebla de ili, kiam oni aplikas ĝin al la agrikulturo, kiu tuŝas ekskluzive la kompleksajn vivdesegnojn. Eĉ ĉe tio la laboratoria esplorado kompreneble povas esti valorega kiel **helpilo** por la interpretado sed nur la tero mem donos al ni la verajn faktojn interpretotajn.

Sciencisto kun Eŭropa reputacio iam diris al mi: „Kiam teorio ne akordas kun la praktiko, tiam certe malpravas la teorio.”

Ekzistas du aktualaj teorioj pri la kaŭzado kaj regado de pestoj kaj malsanoj. Ili vaste diferencas. Valoras, do, ekzameni ilin en la lumo de tio, kio fakte okazas en la praktiko kaj tiom, kiom ĉi tio pruvas iun parton de unu aŭ la alia, konsideri ĉu ne venis la tempo por modifi ambaŭ kaj tiel evoluigi novan teorion pli konforma kun la faktoj. Ĝuste ĉi tian retakson mi intencas provi.

Unue, ni apudeksponu la teoriojn kaj ekzamenu kion ni ricevos.

Ortodoksa Teorio:

a. Malsanoj kaj pestoj ĉiam ekzistas de la pratempoj kaj de la plej frue kronikitaj epokoj la kultivisto ĉiam suferis grandajn perdojn pro tiuj kaŭzoj.

b. Pro (a) modernaj agrikulturaj teknikoj ne estas kulpigeblaj.

c. Modernaj ŝprucaj agplanoj malhelpis por la unua fojo grandajn perdojn pro tiuj kaŭzoj kaj savis multajn rikoltojn kiuj alie estus perditaj. Do, la avantaĝoj multe plipezas ol la malavantaĝoj.

Organika Teorio:

a. Pestoj kaj malsanoj estas simptomoj de biologia malekvilibro.

b. Modernaj agrikulturaj metodoj vaste respondecas pri tiu malekvilibro.

c. La metodo de ŝprucado, ne nur prezentas eventualan danĝeron al la sano, sed ankoraŭ pliigas ĉi tiun malekvilibron. La ekvilibron oni povas resta-

rigi per organikaj metodoj en farmbieno kaj ĝardenoj kaj ĉi tio do estas la sola fidinda longdaŭra respondo al la problemo.

Ni nun konsideru tiujn punktojn laŭvice.

a. Sendispute ekzistas pruvoj, ke la tiel nomataj pestoj kaj malsanoj ĉiam ekzistas. Ĉar la biotika piramido konsistas el tavoloj de diversaj vivformoj, el kiuj ĉiu tavolo nutras tiun super ĝi kaj dependas de tiu sub ĝi nenio alia estas ebla. La diferenco inter natura sovaĝeja komunumo de nutroĉenoj kaj moderna agrikultura komunumo estas ke en la unua la „faŭno kaj flaŭro” ĝuste per ĉi tiu procedo de eterna batalado interne de kaj inter la specoj atingas kolektivan senmortecon — la paleontologio donas abundan pruvon, ke la sovaĝejo sin daŭrigas dum treege longaj periodoj; ke ĝiaj konsistigaj specoj malofte perdiĝis, sed aliflanke ne fariĝis nereguligeblaj.”*) Ĉi tio sugestas, ke kiam speco estas minacata de vere detrua damaĝo, la interdependenco fariĝis malekvilibro. Se tio estas ĝusta, ni povas allasi la unuan klaŭzon de ambaŭ teorioj; sed eble reformuli ilin jene:

Severa damaĝo per pestoj kaj malsanoj estas simptomo de biologia malekvilibro. Tia malekvilibro okazas de tempo al tempo sub primitivaj kaj ankaŭ sub modernaj kondiĉoj, sed multe malpli vaste kiam la medio ne suferis la rapidajn ŝanĝojn, kiujn sole la moderna homo kapablas okazigi.


b. Konsiderante ĉi tiun reformulon de (a), kiu akordas kun la faktoj, ĉu oni povas tute senkulpiĝi modernajn agrikulturajn metodojn? Mi opinias, ke ne. Memoru, ke en la praktiko, estas ĉiam plioftiĝanta serioza ensvarmado de pestoj kaj malsanoj. Ĝis kvardek ŝprucoj en jaro nun estas ordinara afero en fruktarbejoj kaj ŝajne estas necesaj por kontraŭstari pestojn kie antaŭ kelkaj jaroj unu aŭ du ŝprucoj sufiĉis. En kiu maniero la modernaj teknikoj eble kulpas pri tio ni poste priparolos.

c. Kiam serioza malekvilibro jam okazis kaj daŭras neatentite, drastaj rimedoj fariĝas necesaj. Sendube estas vere, ke sub tiaj kondiĉoj la ŝprucado ebligis savi rikolton, kiu alie perdiĝus. (Ĉu aŭ ne valoras savi tiajn rikoltojn tio estas alia punkto, kion ni pristudos poste.) Ke la ŝprucadoj ankaŭ pliigas la malekvilibron, ankaŭ tio estas nerefutebla. La atesto estas nun tiel konvinka, ke D-ro Pickett en la „Kentville Research Station” en Nova Scotia fakte diris, ke „la uzo de preparaĵoj kiel ‘DDT’ en fruktarbejoj, ekzemple, kreante rezistemon”) kaj detruante la naturajn predantojn pri malutilaj insektoj, fakte daŭrigas la malsanon por kiu oni uzis tiujn preparaĵojn en la unua okazo.”

—————

*) Aldo Leopold.

**) Kontraŭ D.D.T.



Mortemaj oranĝuoj en suda Kalifornio: tre tipa kondiĉo. (Foto 1951).

Ĉu estas vere, do, ke oni povas restarigi la ekvilibron kaj la rezultan sanon per 'organikaj' metodoj de produktado? Laŭ la nuna stato de nia scio eble estus troigo diri absolutan 'jeson' responde al tiu demando sed, uzante ĉiam la praktikajn rezultojn kiel nian mezurilon, ni ja rajtas diri, ke fojon post fojo kaj en multaj partoj de la mondo sano kaj malsanrezisto kiuj atingas preskaŭan imun-econ (kaj tial supozeble restarigon de la ekvilibro) sekvis ŝanĝon de la ortodoksaj al la organikaj metodoj. Jen estas nur kelkaj ekzemploj, elektitaj hazarde el inter la tre granda nombro kiujn mi aŭ vidis mem aŭ pri kiuj mi havas senperan dokumentitan ateston.

Usono. Koton. Rikolto en kiu pestdamaĝo kaj ŝprucegardo konkuras unu kontraŭ la alia por superi kaj ĉe kiu la pestoj nuntempe venkas.

Du kotonplantistoj en sudokcidenta Texas transiris al organikaj metodoj antaŭ ses aŭ sep jaroj, anstataŭigante la kemiajn sterkaĵojn per la kompoŝto. Rezulto: multe pliiĝintaj produktoj kaj dum la lastaj kvin jaroj **nenia bezono uzi kiun ajn ŝprucaĵon.**

Oranĝoj. Ŝprucprogramo pligrandiĝas ĉiujare rilate al la nombro de aplikoj kaj ankaŭ al la veneneco de la ŝrucaĵoj. Multaj arboj forlasitaj pro la malsanoj.

Kelkaj kultivistoj en Kalifornio, Texas kaj Florido, transiris al organikaj metodoj. Rezulto: Malsanoj malaperis, **ŝprucado fariĝis nenecesa.**

Maizo. Konstante malgrandiĝantaj produktokvantoj kaj proteinhavo sekvis vastan uzadon de la kemiaj sterkaĵoj.

Farmistoj en Iowa kaj Illinois solaj en siaj regionoj konservis la nivelon de produktokvantoj kaj proteinhavoj ĉar ili

daŭre uzas tradiciajn organikajn metodojn.


Jamaiko. La malsano Panama en bananoj kuraciĝis per organikaj metodoj, inkluzive de stimulo al sovaĝaj herboj, uzo de kompoŝto kaj la enkonduko de brutoj.

Eŭropo. Ĉirkaŭite de ortodoksaj parceloj, en kiuj pestoj kaj malsanoj regas malgraŭ daŭra kaj multekosta ŝprucado, troviĝas organikaj legomkulturejoj, kie oni ne uzas ŝprucojn kaj kie preskaŭ tute mankas malsanoj kaj pestoj. Mi mem vidis du rikoltojn de laktukoj, kiujn apartigis nur unufuta strio de herbo kaj el

kiuj unu apartenis al ortodoksa parcelo, la alia al organika. La unua estis preskaŭ detruita de afidoj, malgraŭ kontraŭinsekta pulvorumado; sur la alia mi malsukcesis trovi eĉ unu insekton. Mi vidis la jenajn malsanojn kuracigitaj per transiro al organikaj metodoj: 'ŝveliĝinta burĝono' en nigraj riboj, viruso en iridoj, nematodoj en terpomoj kaj krizantemoj, multaj el la malsanoj de fruktarboj, la plimulto el tomataj malsanoj, frago-viruso, kaj multaj aliaj. Sur farmbieno la jenaj rezultoj okazis pro ŝanĝo al organikaj metodoj: pli alta sumo de la solidajoj en ĉiuj produktoj; la malapero de mankmalsanoj en bestaroj, inkluzive de tiuj, kiujn nur nun oni komencas rekoni kiel mankmalsanojn, tiel kiel la kontaĝa aborto kaj mastito (eble estas koincido ke en 1952, la jaro dum kiu Francujo suferis la plej severan epidemion de afta bestpesto en sia historio, eĉ ne unu kazo okazis en iu parto de la Dordogne-valo en la Lot-departemento, kie diversigita kampara kulturado ankoraŭ sekvas la plej bonajn tradiciajn organikajn metodojn).

Oni povas obliki tiajn kazojn multfoje, kaj ili aperas ankaŭ en Afriko, Aŭstralio, Novzelando, kaj multaj aliaj landoj. Krome, ili pliiĝas ĉiujare. La nombroj jam de longe preterpasis la punkton de statistika signifo. Devas esti io grava, kion oni povas lerni de ili. Kial ankoraŭ ignoras aŭ tro malalte taksas ilin la ortodoksaj sciencaj institucioj? Ĉu la sciencistoj estas tro okupataj serĉante pri la malĝustaj aferoj? Aŭ ĉu ili faras la malĝustajn demandojn?

Estas senduba fakto, ke preskaŭ ĉiuj agronomiaj reserĉejoj nuntempe sin okupas, serĉante rimedojn por kontraŭbatali plantajn kaj bestajn malsanojn kaj pestojn. Ĉi tiu klopodo fariĝas pli kaj pli multekosta ĉiujare kaj havas la aspekton



Organika oranĝujaro en la sama distrikto, fotita dum la sama tago kiel la alia.

de perdita batalo. Ĉu ne estas eble, ke ĉi tio devenas de la fakto, ke la malsanoj tiom obsedas kaj absorbas la sciencistojn, ke ĉi tiuj preterlasas studi la sanon? La plimultaj ŝajne demandas, „Kiel ni povas detrui tiun aŭ alian peston, aŭ kuraci tiun aŭ alian malsanon?” La demando montras negativan sintenon, ĉar el la plej optimista vidpunkto la respondo povas esti nur reboniga, sed iuj reserĉistoj montrante novan vojon kiun aliaj sekvas, komencis proponi la pozitivan demandon, „Kio estas la sano; kiel ni povas plifortigi ĝin kaj tiel stimuli la naturan rezistemon?” Ĉiuj ĝisnunaj indikoj sugestas, ke la respondoj al ĉi tiu demando kredeble estos multe pli frukto-donaj en la produktaj rezultoj, ol ĉio ajn kion jam atingis la agrikultura scienco.


Kio, do, estas la sano? La origina signifo de la angla vorto, 'health' (sano) estas tuteco (ĉholeness), kion oni devus ne forgesi. La mortinta Aldo Leopold, fama Usona ekologo kaj naturisto, difinis ĝin kiel la „kapablo de vivanta organismo interne renovigi sin.” Du anglaj ekologiaj kaj reserĉistoj difinis ĝin kiel „reciproka sintezo inter la organismo kaj la medio”. La esenco de ambaŭ difinoj estas la ideo, ke la sano estas ne stato, sed dinamika procezo. Oni ne povas pesi, mezuri, aŭ analizi procezon, sed kelkfoje oni povas sekvi ĝian direkton. La organika kulturisto kredas, ke ĝia direkto estas identa kun la fluo de la

nutrociklo kaj ke, tial, por plifortigi ĝin, oni devas teni malferma ĉiun el la vivkanaloj de tiu fluo, kvankam ankoraŭ neniuj scias kiuj ili ĉiuj estas, nek la veran naturon de la fluo mem. Ke la tero estas granda provizejo por ĝi, tamen, qajnas esti klare. Kio, do, estas la tero? Ankoraŭfoje mi donu difinon de Leopold. „La tero... ne estas nur grundo; ĝi estas fontano de energio, kiu fluas tra cirkvito de grundoj, plantoj kaj bestoj. Ĉenoj de nutraĵo estas la vivantaj kanaloj, kiuj kondukas la energion supren: la morto kaj la putrado redonas ĝin al la grundo.” La grundan fekundecon li difinis jene: „La kapablo de la grundo ricevi, konservi kaj transdoni la energion.”

Jen ni havas ideon kiu kapablas revoluciigi la agrikulturan pensadon kaj praktikon — ke la nutroĉeno estas ne nur fluo de nutraĵoj de unu vivoformo al

alia, sed ankaŭ cirkvito de energio. La kemia scienco sur kiu la plimulto de la agrikultura scienco ankoraŭ estas bazita, tute evidente estas maladekvata por studii tian fluon. Vere ĉi tiu aparta formo de la energio (kiu distingas la vivantaĵon de la senvivaĵon) ankoraŭ ne estas mezurebla per kiu ajn agnoskata scienco. Se — kio ŝajnas kredebla — ĝi povas esti transdonata nur de la vivo, la diferenco en la rezulta kresko de plantoj post la apliko de, ekzemple, vivanta kompoŝto, kaj la cindroj de la sama kompoŝto post bruligo estas facile komprenebla. Evidentiĝas ankaŭ, ke estas erarige kalkuli la supozatajn bezonojn de plantoj laŭ la konsisto de iliaj cindroj. Io, kio estas kemia sama, povas esti tre malsama kiel kondukilo de vivanta energio.

Lastatempe reserĉado pruvis, ke la



Natura limigo de malutilaj bestoj. Por limigi malutilan bestojn en fruktarbaroj, oni plej ofte uzas venenon kaj kaptilojn. S-ro Antony el Kalifornio preferas intelligentan kunlaboron kun la naturo: li provizas dometojn por la strigoj, kiuj kompanse prizorgas por li la bestlimigon.

plantoj ensorbas per la radikoj tute komplikajn organikajn kombinaĵojn; ke tiuj kombinaĵoj estas la produktoj de mikrobiologia grunda vivo; ke de ilia enesto kaj de ilia ensorbo fare de la plantoj dependas la kapablo de tiuj ĉi fabriki la proteinojn en la kvalito, kiu certigas reziston kontraŭ malsanoj kaj pestoj, normalan reproduktadon, kaj adekvatan nutraĵon por la besta konsumanto de la planto. Ĉi tiu nova scio jam profunde aliigas la nunepokan instruon pri la rolo de la organika materialo en la grundo.

Sen kompreno pri ĉio, kio estas aŭ povas esti implikita, ŝajnas, ke per sia insistado pri la graveco de la vivo; per la redono de ĉiuj organikaj restaĵoj al la grundo; per la diversigo de rikoltoj kaj brutoj; per la rajto al la vivo por la bestoj kaj la vegetaĵoj krom tiuj, kiuj havas rektan ekonomian valoron por li

mem; per sia evito de krudaj kemiaĵoj kaj per sia provo provizi la kondiĉojn en kiuj la natura biologia ekvilibro malebligas la obliĝon de unu aparta speco ĝis pesta proporcio — ke per ĉio ĉi la organika kulturisto evoluigas metodojn, kiujn iam en la estonteco oni agnoskos multe pli sciencaj ol tiujn kiuj nunepoke pretendas tiun nomon. Multaj el la tiel nomitaj plibonigoj en la moderna agrikultura tekniko estas lerte priskribitaj de Leopold kiel plibonigoj al la pumpilo — ne al la puto. Ili disvolviĝis rezulte de pensprocedo, kiu ignoris la kompleksan interagadon de specoj, kiu konstruis la originalajn fekundajn grundojn: kiu celkonscie planis la detruon de tutaj specoj sen penso pri la demando, ĉu ilia daŭra ekzisto eble estas necesa por konservi la grundan fekundecon, kiun ili helpis kon-

grundan fekundecon, kiun ili helpis konstrui; kiu rekomendis kuracajn rimedojn por trakti la problemojn, kiuj rezultas el malpliiganta fekundeco; kiu traktas nur simptomojn; kaj kiu, ignorante la danĝersignalojn de la natura, 'protektas' la plantojn, kiuj jam malfortiĝis ĝis la punkto, kie ili jam perdis sian kapablecon interne sin renovigi per la uzo de mortigitaj qprucaĵoj. Tiel oni nun aldonas la riskon de arego de venenoj al nutraĵoj, kiuj jam havas maltan nutran valoron (kapablon transdoni energion).

Ja estas facile kompreni kiel ĉi tiu stato de aferoj starigis. La motivoj en preskaŭ ĉiu kazo estis bonaj. La sola

kulpo, kiun oni juste povas kondamni, estas la aroganteco de la epoko, kiu supozis, ke la homo plibone scias ol la naturo kiu naskis lin.

La klimato de la pensado nun ŝanĝiĝas. Tiu ŝanĝiĝo en la pensado ĉiam antaŭiras ŝanĝon en la agado, sed oni perdu nenian ŝancon por rapidigi la ŝanĝon, antaŭ ol fariĝos tro malfrue. Tiu-cele, ju pli baldaŭ la organikaj pioniroj kaj la ortodoksa scienco komencas interproksimiĝi, des pli bone. Ĉi tio povas okazi ne per la dogmismo sur kiu ajn flanko, sed nur per la senantaŭjuĝa preteco kunlabori por starigi la novan, ek-naskiĝantan, sciencon pri la grunda sano.

(Origine verkita de Lordino Eve Balfour, ĉefo de la Brita „Soil Association” (Asocio pri la Grundo): tradukita de ano John Leslie, laŭ permeso de la aŭtorino.)

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefono ARNold 90-81

14000-15000 ESPERANTISTOJ SURVOJE DUM UNU JARO

Rezulto de la Enketo pri la aranĝoj dum 1956,
en kiuj Esperanto estas uzita

Laŭ komisiono de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, subskribinto organizis enketon kaj kompilis statistikon pri la kongresoj, kunvenoj, renkontiĝoj, feriosemajnoj kaj similaj aranĝoj, kiuj okazis en la daŭro de la jaro 1956 kaj en kiuj Esperanto estas uzita.

Kvankam al la organizintoj de la pli gravaj aranĝoj ni sendis presitan demandaron en tri ekzempleroj (el kiuj oni resendu du kaj konservu la trian por sia propra arkivo), kaj kvankam ni eĉ aldonis respondkuponon, multaj el la organizintoj ne resendis la demandaron. La Statistiko do povas esti nur nekompleta. Ĝi ampleksas entute 89 aranĝojn en 25 landoj, kaj ili estas vizititaj de entute 12.065 personoj. Sendube okazis pli multaj aranĝoj de la nomitaj specoj, precipe federaciaj aŭ regionaj kunvenoj, limrenkontoj, ferio-restadoj, fremdlandaj ekskursoj kaj karavanoj k. sim. Multaj samideanoj ankaŭ individue vizitis siajn lingvo-amikojn en eksterlando. Verŝajne ni ne mistrafas, taksante la tutnombron de la personoj, kiuj dum 1956 partoprenis en la diversaj esperantistaj aranĝoj (kun escepto de la ordinara klubkunvenoj, kursoj kaj propagandaj vesperoj) je 14.000—15.000.

Ni aldonu, ke ni kalkulis prefere ne la nombron de la aliĝintoj sed tiun de la *ĉeestintoj*, kvankam la diferenco kelkfoje estas vere granda. Ekzemple, al la projektita Tut-ĉeĥoslovaka Esperanto-Konferenco aliĝis 755 sed pro lastmomenta malhelpo de tiu konferenco venis nur 44 gesamideanoj al la anstataŭe aranĝita amika kunveno; la 43-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj aliĝis 757 sed ĉeestis nur 394 personoj; la 17-an Hispanan Kongreson de Esperanto aliĝis 525 sed ĉeestis nur 451; la 26-an Kongreson de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista aliĝis 163 ĉeestis 128. Ankaŭ la Universalan Kongreson ĉeestis ne ĉiuj aliĝintoj. Se la ĵus nomitajn aranĝojn ni kalkulus laŭ la aliĝoj anstataŭ la ĉeesto, ni atingus nombron je 1400 pli altan.

Ni ankaŭ ne kunkalkulis la nombron de la esperantistoj, kiuj ĉeestis kunvenojn, kie prelegis eksterlandaj samideanoj. Ĉi-loke ni atentigas speciale pri la prelegvojaĝo de la novzelandaj geedzoj Potts, kiuj parolis antaŭ miloj da gesamideanoj en preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo, pri la prelegoj de la Konstanta Kongresa Sekretario, s-ro G. C. Fighiera, en diversaj landoj, kaj pri la 109 prelegoj de la franca samideano Roland Dupuis en Svedujo (ĉeestitaj de entute 15.000 personoj, kvankam plejparte neesperantistoj). Menciindaj estas ankaŭ la vojaĝoj de la oficiala sendito de la Esperantomovado, lic. Tibor Sekelj en orientaj landoj, kaj la tra-Eŭropo-vojaĝo de la simpatia familio Doneis el Texas (Usono). Ĉion ĉi nia Statistiko ne entenas.

Ĉi-supra mallonga resumo pravas unu plian fojon, ke Esperanto delonge ĉesis esti nura lingvo-projekto, kaj ke ĝi en la vera senco de la vorto estas *vivanta lingvo de vivanta popolo*, uzata ne nur por korespondado sed je vasta skalo servanta ankaŭ por la interkomunikado buŝa.

Nian koran dankon al ĉiuj gesamideanoj, kiuj, komprenante la gravecon de la Enketo, bonvolis kunlabori je ĝi kaj resendis la Demandaron.

La Komisiito de C.E.D.:
TEO JUNG

UNUA EĤO DE LA ALVOKO POR FINANCA HELPO AL CED

En la julia-aŭgusta numero de „Esperanto” ni mallonge prezentis la gravecon de CED kaj akcentis, ke ĝia tuta laboro estas serioze endanĝerigita, se la esperantistaro ne kontribuos finance al ĝiaj celoj. Sube ni publikigas ciferojn pri novaj donacoj, kiuj klare montras, ke la alvoko por financa helpo ne restis seneĥa. Ni aparte atentigas pri la sumoj anonime kolektitaj dum la Universala Kongreso en Marseille. Estis vere ĝojige vidi kiom da personoj, post kelkaj klarigoj pri la laboroj de CED, rapidis al la kolektotablo por doni sian kontribuon, ĉiu laŭ siaj eblecoj. CED kaj la Movado estas same dankemaj al tiu junuleto, kiu donacis kelkajn frankojn de sia poŝmono, kiel al tiu anonima donacinto, kiu metis sur la tablon bankbiletan de 5.000 frankoj. CED speciale mencias la grandaniman donacon de Gesinjoroj Jungton el Usono. Ni ripetas tion, kion ni diris en la lasta alvoko:

„Se ĉiu el la 25.000 membroj de UEA oferus por CED nur la sumon de 10 ŝilingoj aŭ egalvaloron, CED povus trankvile labori dum pluraj sekvantaj jaroj! **Tiuj, kiuj komprenas la gravecon de CED, bonvolu pripensi tiun fakton kaj agi konforme.**”

Oni ankaŭ ne forgesu, ke CED jam komencis plani specialajn laborojn okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof en 1959.

Donacoj al CED

	£	ŝ	p
Stato je la 15-a de majo 1957	32.10.	0	
S-ro S. D. Saft, Britujo	1.	0.	0
S-ro J. Hartley, Britujo	0.10.	0	
S-ro R. Seddon, Britujo	1.	0.	0
Centra Dana Esp. Ligo, Danujo	4.	2.	8
S-ro F. Schwartz, Svislando	0.	8.	0
S-ro B. B. Beaumont, Britujo	1.	0.	0
S-ro E. P. Crabtree, Britujo	0.10.	0	

Kolektitaj en Grésillon:

S-ino Combebias, Francujo	1.000	fr.fr.
F-ino Fried, Danlando	1.000	„
S. Dardarin, Francujo	1.000	„
Du anonimaj	2.000	„
S-ro Lundquist, Svedujo	380	„

5.380 fr.fr.

Kolektitaj dum la unu ĝenerala kunveno de UEA en Marseille fr. 32.500

Kolektitaj post la ferma kunsido en Marseille „ 19.830

fr. 57.710 = 46. 4. 0

Kolektitaj en Marseille 10 g.m. kaj 50 hisp. pesetoj	1.	3.	8
Gesinjoroj Jungton, Usono	18.	3.	9
S. H. Wilkens, Germanujo	0.15.	0	
S. P. Hendriks, Nederlando	0.18.	9	
S. H. G. Boscarino, Italujo	0.11.	5	
Ing. Sven Sjöblon, Svedujo	1.	8.	2
Gesinoroj Holmes, Britujo (dua donaco en tiu-ci jaro)	2.14.	9	
Gesinjoroj Helmuth, Usono	0.10.	5	

Stato la 6-an de septembro 1957 113.10. 7

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, 7, Eendrachtsweg, Rotterdam, C., Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris, X, Francujo; al ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA, aŭ al CED rekte, je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

K. Kalocsay :

Letero al William Auld

... blinde, palpe ... kuraĝon kaj
obstinon! (El la „Infana Raso”)

I.

„Ve, fuĝe kuras for de ni, Postumus,
la jaroj, kaj fervora pieco ne
prokrastas faltojn kaj maljunon,
nek la nekompatigeblan morton.”

Horaco kantis per ĉi lamento, kaj
resonas lia voĉo, amiko Auld,
en via granda rapsodio,
se pli moderne, ne malpli triste.

Sed ne nur tio. Por la homaro vi
baraktas, por la raso etula vi
ekzaltas, kaj ĝi superkreskas
por vi la individuan sorton.

Sed kia estos do tiu beb-homar',
se ĝi elkreskos? Kaj ĉu ne eble, ke
ĝi mortos bebe, sterniĝinte
sub tiu hida H-bomba fungo?

Fariĝis dio-bebo la homo-beb',
sun-peco estas jam lia luda pilk',
tro lertas li, tro malprudenta,
eble li sin neniigos per ĝi.

Sed tamen vivas en ni naiva fid',
Voltaire-on citas kun la Madach-a vok':
„Gardenon vian kultivante,
homo, penadu, fidante firme.”

II.

Sed voĉo diras: „Per ĉi fido
vin trompas rana perspektiv'!
Ne mistifiku vin, homido,
ja kio estas via viv'?
Nur pormomenta ekrigido
de movo — ŝajno kaj fiktiv'.
Desperu, mortu! Per la fido
vin trompas rana perspektiv'.”

V.

Tamen, ni rifuzu spite mokon de la voĉo malica
pri la rana perspektivo — ĝi mensogas per sia ver'!
Tiu perspektivo estas homa, nana kaj ega,
kelkmiljara momenteto — sed kun kia svarmo de riĉ':
kreoj kaj detruoj, sortoj, damnoj, luktoj, entuziasmoj,
de Sargono ĝis Zamenhof, kiel al ni vi diras, Auld.
L'efemero multajn jarojn vivas dum la viv' unutaga,
kaj la daŭro de homvivo ŝajnus al ĝi tuta eon'.
Sed ni vivas ne nur vivon nian, vivas en ni paseoj
per literoj, ŝtonoj, spertoj, moroj, kantoj, rasrememor'.
Kaj nin portas fantazio — kiel bone reiri, William,
kun vi ĝis la praaj tempoj, vagi sur avoserĉa voĵ'
ĝis prapatro via Ruben, ĝis la keltoj kaj romianoj,

III.

„Dufoje vi ne paŝas en la saman
riveron” — Ĉio pasas — atomkerno
disfalas — nuno mankas — la alterno
tuj ŝanĝas la estontan en iaman.

Nenio daŭras — ĉi sentencon ŝaman
rekoni ni ne povas sen konsterno.
Nenio daŭras — blovas for Eterno
la sebkandelon kaj la astron ŝlaman.

Kaj volas ni, momentbilliononoj,
nin eternigi, daŭri tra eonoj,
per idoj, venkoj, kreoj, bronzo, verso,

neniam ĉesi kiel sfermuziko
sur Tero, kiu estas ŝaŭmveziko
en oceano de la universo.

IV.

Ne, Auld, ne celon ni plenumas,
ĉar kie estas tiu celo?
En la elektron-karuselo
konscio por moment' eklumas,

forflagras, dum moment' postfumas,
kaj ree regas la malhelo.
Ne, Auld, ne celon ni plenumas,
ĉar kie estas tiu celo?

Ho ve, ne celo nin konsumas,
sin mem konsumas kun kruelo
la vivo, dum sur sia relo
eternaj elektronoj zumas.

Ne, Auld, ne celon ni plenumas.

tra generoj kaj gravedoj, kaj ĝis fiŝo kaj ĝis ameb'!
 Ludi kun vi oldojn mitojn, diojn krei kaj neniigi,
 kaj mediti pri la granda mito, pri l' mistero de nask',
 kaj pri l' buĉo de l'naskitoj, pri ĉi arto de l'generaloj
 naŭzgrimaci per hibridaj vortoj, ke pli piku la pik'.
 Kaj sopire ami, ami, voki al virino amata
 kun la krud' de anatomo, kun la molo de trubadur',
 kaj palpeti al futuro kun konfuza sent' super ido
 propra, kiun oni kroĉas al la ĉen' por plua ĉener',
 kaj superfuturi: flugi trans la sunsistemon al astro,
 kies lumo la planedon vartas, kiu atendas nin,
 sed en la raketa ŝipo nostalgie memori pri la
 ludoj, karaj bagateloj de l'Ithako de l'infanaĝ'.
 En la cerb' kirliĝas astroj kaj doktrinoj kaj paradoksoj,
 kaj la moro de mormonoj kaj pagana nud' de O'Cane,
 sklavtumentoj, odalisko, princpalaco, drinko taverna,
 Iliono, Hiroŝima, konussekoj, fajroador',
 tigroj kun la sabrodentoj, ŝtatastrojaj sindikatastroj,
 protestant' katolikanta pri Orsippas en la aren',
 skvama korpo de la saŭroj, arde blanka haŭt' amatina,
 okulturno puritana, Les Sylphides sur gramofon',
 trumpetkrio: evoluu, granda homo de eta cerbo!
 Pacienĉ': ni havas tempon; malpacienĉ': jam estas temp'!
 Terformiĝo, homapero, homa ekbalbuto unua,
 okulisto-homarano Varsovia dum la milit',
 la saĝum' de l'Predikanto, riproĉad' insulta-karesa
 al homaro; urĝo vivi ĉar jam orelon pinĉas mort' ...
 Kio pli ankoraŭ svarmas draste aŭ en nura aludo
 malespere aŭ instige, kaj konfuze, kia la viv'!
 Ĉu vojaĝi en la spaco kun la rapideco de lumo?
 Brr, ja froste al ni estas en la ducentgrada minus',
 ĝoji, larmi, beni, sakri estas nesto varma la tero,
 (ofte eĉ inferne varma), ŝirmos nin dum jarmilion'!
 Se ĝi estas ŝaŭmveziko, bone, estas daŭra veziko
 por ni, la infana raso, ni plenkreskos sub ĝia ŝirm',
 inkubsonĝoj el bubaĝo estos la masakro de Ĝingis,
 krani-monto Tamerlana, fajroj de la aŭtodafe',
 gaso de la koncentrejoj, koketado kun atombombo,
 la kruela praa leĝo: homo homini lupus est.
 Tiu stelo de l'tri reĝoj venos vere (verdakolore)
 por la blankaj, flavaj, nigraj, por la tuta frata homar' ...

La paseoj nin koncipis kaj mamnutris, sed hororigas,
 el la nuno ni rifuĝas al la esperata futur'.
 Sed momentbillionono de l'homvivo, kun la paseoj,
 kaj kun la futur' revata, estas por ni tuta eon'.
 Tre mallongan tempon vivas la matena guto de roso,
 sed dum ĝi ekzistas, en ĝi respegulas sin la ĉiel'.

VI.

Ĉu mi ĝuste interpretis
 vin, ho kara Auld, aŭ falsis?
 Nu, mi sur paperon ĵetis.
 kio tra la cerbo valsis,
 kiam „La Infana Raso”
 min ekkaptis kaj katenis,

kaj al sia vers-amaso
 ĉiam min re- kaj retrenis.
 Dum la lego kaj relego
 kreskis mia poemego,
 nun ĝi iru, William Auld,
 al vi, kiel dank-herold'.

29.III.1957.

„Grajnoj en Vento”

La Centra Oficejo de „Grajnoj en Vento”, la interlernejaj rondoj internaciaj, daŭre serĉas kunlaborantajn klasojn kaj grupojn por la sekvantaj rondoj:

- 6-a rondo/gvidanto: s-ro Svoboda Zlatnar, Zagreb, Jugoslavio.
- 7-a rondo/gvidanto: s-ro Toma M. Stevanoviĉ, Roanda, Jugoslavio.
- 8-a rondo/gvidanto: s-ro Peter Anso, Tartu, Estonia SSR.
- 9-a rondo/gvidantino: s-ino B. M. Delgado, Tamworth, Anglujo (speciala rondo por etuloj 4-8-jaraj).
- 10-a rondo/gvidanto: Junulara Esperanto-Sekcio, Celje, Jugoslavio.
- 11-a rondo/gvidanto: s-ro Hristo Manolov, Tirnovsko, Bulgario.
- 12-a rondo/gvidanto: s-ro Zulfikarpaŝie Iso, Pula, Jugoslavio.

En marto, junio, novembro, ĉiu rondo eldonas — je 20 ekzempleroj rezervitaj por la kunlaborantoj — originalajn verkojn de gelernantoj. Estas starigitaj tri specoj de rondoj: por etuloj 4-8-jaraj, por geknaboj 8-15-jaraj, por gejunuloj 15-20-jaraj.

Iom post iom, la interlernejaj rondoj „Grajnoj en Vento” disvastiĝas. Kial ankaŭ vi ne partoprenus?

Aliĝu senprokraste ĉe la Centra Oficejo! Kunlaboru jam por la novembra eldono!

Centra Oficejo de „Grajnoj en Vento”
 Marcel Erbetta, Rue des Pins 66
 Bienne - Biel 7, Svislando

KUNVENO DE LA FERVOJISTOJ OKAZE LA 42-an UNIVERSALAN KONGRESON

La 5an de Aŭgusto la fervojistoj el 9 landoj (Bulgario, Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavujo, Svedujo, Saarlando) kunvenis. Komisiita de la „Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots” (FISAIC) — „Internacia Federacio de Artaj kaj Intelektaj Asocioj Fervojistaj” — F-ino LEMONNIER, Prezidantino de la franca sekcio de IFEF klarigis la celojn de tiu impona Federacio, kiu celas ebligi kulturajn rilatojn inter la fervojistoj sur la internacia tereno. Jam notindaj realigoj efektiviĝis sur tiu kampo: la FISAIC ricevis agnoskon de la Franca Ministerio pri Edukado kaj ĝi jam sukcesis organizi inter diverslandaj sekcioj altvalorajn manifestaciojn. Plurfoje okaze de tiuj manifestacioj la mondlingvo estis uzata.

Pro tiu fakto la delegitoj proponis intensigi la uzadon de Esperanto en tiu medio kaj ĉiu delegito raportis pri la agado de la landaj sekcioj ĉe kulturaj manifestacioj. Kiel konkludo de tiu kunveno F-ino LEMONNIER akcentis pri la intereso, kiun FISAIC kaj pli speciale ĝia ĝenerala Prezidanto D-ro MOLLION montras por Esperanto. Rilate la profesian kampon, ŝi ankaŭ atentigas la delegitojn pri la intereso vekita ĉe U.I.C. (Unuiĝo internacia de Fervojoj) kaj pli speciale ĉe ĝia Centro de Dokumentado koncerne la laborojn de I.F.E.F. por ellaboro de teknika terminaro.

TRA LA MONDO

• **Ora Jubileo de la Brazila Esperanto-Movado** okazis en Niteroi kaj Rio de Janeiro 14—21 de aŭgusto. Dum la kongreso okazis i.a. inaŭguro de Strato „Esperanto” en Niteroi, vizitoj al ŝtataj kaj urbaj aŭtoritatoj teatra vespero kaj ekskursoj. La kongreso brile sukcesis kaj estis kulture altnivela. Inaŭguran paroladon faris s-ro ambasadoro J. C. Macedo Soares. Partoprenis ĉ. 300.

• **Esperanto en sociala laboro.** La 24. kaj 25-an de majo okazis en la Reprezenta urba domo en Praha konferenco pri la socialaj problemoj de invalidoj. Partoprenis delegitoj de centraj ŝtataj oficejoj, ministerio de la popola sano, sciencaj fakuloj kun delegitoj de malsanuloj. La ĉefan referaton faris s-ro Jos. Ambroz, fakdelegito de UEA pri sociaj aferoj. Interesatoj povas ricevi detalojn en Esperanto de s-ro Jos. Ambroz, Spac-kova 3, Brno — Zidenice, Ĉeĥoslovakio.

• **Novajoj el Barcelono.** La 28-an de majo Radio Nacional de Espana disaŭdigis prelegon de la poeto F. Vila pri la moderna graveco de la Esperanto-Movado. La barcelona ĵurnalo „El Correo Catalan” ankaŭ aperigis intervjuon kun li pri la praktika kaj morala utilo de Esperanto en la moderna internacia mondo.

• **Polaj aŭtoritatuloj favoras Esperanton.** La 23-an de majo ministro pri Kulturo kaj Arto, s-ro Kuryluk, akceptis delegitaron de la Ĉefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando. La delegitaro ricevis promeson de la ministro helpi al la penadoj de la Asocio.

• **Ekfloro en la E-Movado en Silezio.** Tre vigle laboras la E-grupo en Katowice. En majo ĝi aranĝis kunvenon en la planetario en Chorzow, kiun partoprenis ĉ. 400 esperantistoj. Pri ĝi vaste raportis la pola gazetaro. La loka vojevoda estraro tre favoras la Esperanto-agadon kaj promesis financan subtenon. La grupo intencas proponi al la urba konsilantaro de Katowice nomi unu el la stratoj de la urbo laŭ Zamenhof.

• **Sukcesa Kongreso de Sudhungarlandaj Esperantistoj.** Okazis en Szeged la 29-an kaj 30-an de junio. El la dutaga programo aparte menciindaj estas inaŭguro de nova Esperanto-strato, prezento de Esperantlingvaj sinkronfilmoj kaj tre impona kaj efika ekspozicio, kie ankaŭ funkciis poŝtofiĉejo, kiu uzis E-lingvan stampilon. Ĉ. 300 E-istoj partoprenis la kongreson.

• **Unua Esperanto-placo en Hungarlando.** Okaze de la Nord-Hungarlanda Kongreso en Miskolc la 13-an de junio la urba estraro decidis doni al tre grava placo en la urbo la nomon „Esperanto”. Ĉe la festkunveno, kiu okazis en urbdoma salonego, la ĉefo de la urba kultursekcio, s-ro Varga, faris salutparoladon en la nomo de la urba konsilantaro, akcentante la liberigan karakteron de Esperanto por lingve subpremataj popoloj.

• **„Esperanto en Urugvajo.”** En kadro de grandega ekspozicio aranĝita de la urugvaja registaro pri la vivaspektoj de la nacia kulturo, komerco, industrio, trafiko, ktp., la Urugvaja Esperanto-Societo ricevis lokon disponigitan de la organiza instanco, kaj tie starigis standon kun la devizo: „Esperanto en Urugvajo”. Ĝi vekis grandan atenton ĉe la publiko kaj liveris superrigardon pri la E-agado en Urugvajo.

• **La 52-a Skota Esperanta Kongreso.** Okazis je la 24—27a de majo ĉe Wiston Lodge, Biggar, Lanarkshire. Gaja amuzvespero, Diservo, ekskursoj kaj interesa prelego de D-ro R. H. Osborne, el la Universitato Edinburgh, garantiis sukceson.

• **Norvega Esperantista Ligo** jarkunvenis dum la Pentekosto en Kristiansand. La jarkunveno estis bonege aranĝita de la Esperantoklubo de Kristiansand. Okazis ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto A/S, kiu decidis inviti al pligrandigo de la akcia kapitalo por povi eldoni grandan norvegan-Esperantan vortaron. En la kongreso, lerneja inspektoro A. Strai, inĝeniero J. A. Kleven kaj instruisto D. Mjølhus ricevis ordenon de N.E.L. „Pro Merito”.

• **Ora Jubileo.** Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Brazilo, dediĉas la julian numeron de sia organo „Koooperativismo” al la ora jubileo de esperantista laborado de la grandmerita brazila Esperantisto Iŝmael Gomes Braga. In-



Pola Registara Delegacio inaŭguras Esperanto-ekspozicion en Hanoi, okaze de la 70a Datreveno de Esperanto.

tervjuo, omaĝaj artikoloj kaj poemoj inde prezentas la amon kaj respekton de la brazilaj Esperantistoj por sia pioniro.

• **Oficiala honorigo de merita Esperantisto.** S-ro W. A. Gething, bone konata Esperantisto kaj prezidanto de la Londona Klubo, ricevis la Ordenon de la Brita Imperio antaŭ nelonge pro siaj oficialaj laboroj.

BELARTA ALDONO AL LA REVUO „ESPERANTO”

Jam dum du jaroj montriĝis pli kaj pli draste, ke pro la kresko de la agado de UEA sur ĉiuj kampoj kaj pro la granda disvastiĝo de Esperanto tra la tuta mondo ni devis dediĉi ĉiam pli multe da spaco sur la paĝoj de nia revuo al movadaj aferoj, je kosto de la belarta kaj literatura sekcioj. Pri la novaj sukcesoj de nia afero oni povas esti nur kontenta; tamen estas fakto, ke la forteco de nia literaturo estas unu el la gravaj faktoroj, kiuj kontribuas al nia progreso, kaj la Komitato de UEA deziras, ke nia revuo daŭre laboru ankaŭ sur tiu kampo.

Tial ĝi decidis eksperimente eldoni, je la fino de marto 1958, belartan aldonon al la jarkolekto 1958. Tiu aldonon, kiu havos 68 paĝojn, estas presota sur la sama papero, kaj havos la saman formaton, kiel la revuo „Esperanto” — unuvorte, ĝi kun la revuo formos unu tutajon, kiu povos esti kunbindita por formi eĉ pli agrablan kaj valoran volumon. La enhavo estos belarta kaj literatura, kaj kontribuos konataj aŭtoroj novaj kaj malnovaj. Ni estas certaj, ke niaj legantoj deziros posedi ankaŭ tiun valoran kajeron.

La prezo de la kajero estos 2,75 gld. (11 steloj) por individuaj membroj de UEA, kaj por aliaj 3,25 gld. (13 steloj). Ni invitas la abonantojn de „Esperanto” kaj ĉiujn aliajn esperantistojn jam nun antaŭmendi ĝin. De la sukceso de la unua numero dependos la plua evoluo de tiu ĉi eksperimento; kaj la eldonkvanto dependos de la nombro de antaŭmendoj. Do se vi volas havi la aldonon al nia revuo 1958, ne atendu, sed mendu ĝin tuj ĉe la Centra Oficejo de UEO, aŭ ĉe via landa peranto.

● **Internacia Ekspozicio pri Arto inter la Fervojistoj** okazis en Bologna, Italujo, 5—13 de junio. Tie la fervojistoj de pluraj nacioj parolis al aliaj kamaraĵoj de laboro pere de la lingvo de la arto kaj ankaŭ per Esperanto, ĉar multaj Esperantistoj partoprenis en tiuj manifestacioj de frateco kaj kompreno.

● **La Kopenhaga Esperantista Klubo** ekskursis al Frederikssund, la urbeto de Vikingoj, la 23-an de junio, kun multaj partoprenantoj, i.a. pluraj eksterlandaj samideanoj. Tie oni aŭskultis prelegojn pri la vikingoj kaj la urbo kaj rigardis la vikingan ludon pri la reĝofilo Amled, kiu estas la bazo de la tragedio Hamleto.

● **Trafikaj informoj en Esperanto.** Ĉiuj aŭtomobilistoj, kiuj transpasas la dan-germanan limon survoje al Danlando, ricevas slipon kun informo en angla, germana, franca kaj Esperanta lingvoj, ke estas necese rezervi lokon al la aŭtomobilo por povi transvojaĝi la markolon Storebaelt. Estas la Danaj Ŝtatfervojoj, kiuj ekuzis Esperanton por tiu servo.

● **Internaciaj Ferioj en Saint-Claud.** La vigla grupo „Unueco” de Saint-Claud, Charente, Francujo, organizis de la 28/7 ĝis la 2/8 internaciajn feriojn en tiu vilaĝo, kiuj malgraŭ malmulta propa-

gando bonege sukcesis. Samideanoj el kvar landoj partoprenis la aranĝojn, kiuj estis variaj laŭ ekskursoj kap amuzaĵoj. La regionaj ĵurnaloj kaj la radio favore raportis.

● **Esperanto-stando kaj oficejo** funkciis ĉijare dum la Internacia Foiro en Padova en junio, kiel en antaŭaj jaroj, sub gvido de s-ro Giovanni Saggiori, delegito de U.E.A.

● **Gvidfolioj.** La urboj Oslo kaj Bingen eldonis gvidfoliojn en Esperanto kun bildoj.

● **Esperanto en la gazetaro.** La filatela revuo „Der Sammlerdienst” (germana) kaj la gazeto „Kisalföld” (hungara) publikigas Esperanto-kursojn. Germana gazeto „Allgemeine Zeitung” aperigis je 13./14. de julio artikolon pri la japana ĵurnalistino, f-ino Geŝiko Kajino, kiu dum kelkaj monatoj travojaĝis Eŭropon pere de Esperanto. Portugala gazeto, „Republica”, aperigis je 1-a de jul. artikolon de Saldanha Carreira kun Esp.-informoj, hispana gazeto „Diario de Barcelona” je 5-a de junio pri Esperanto kiel internacia lingvo. Pola „Tribuna Robotnicza” je 13/14 de aprilo aperigis artikolon pri la atingajoj de Esperanto kaj pri la 40-a datreveno de la morto de Zamenhof.

ESPERANTISTA VIVO

Geedziĝoj

Aris-Lach. La 12-an de oktobro 1956 needziĝis V. Aris, F.D. de U.E.A. en Tarrasa, kaj Montserrat Llach. Ilia adreso estas Str. Galileo, 359-1, Tarrasa, Hispanujo.

Greutert-Invernizzi. Geedziĝis la 9-an de junio 1957 svisa samideano Kurt Greutert kaj itala samideanino Celestina Invernizzi.

Andresen-Hanski. La 28-an de julio 1957 geedziĝis dana samideano Sören Andresen, ĉefdelegito de U.E.A. en Danlando, kaj finna samideanino Hilikka-Liisa Hanski.

Hornö-Ojstersek. La 15-an de junio 1957 geedziĝis Hornö el Göteborg, Svedujo kaj Albina Ojstersek el Ljubljana, Jugoslavujo.

Pennazio-Pipino. Geedziĝis la 23-an de junio 1957 Renato Pennazio kaj Maria Teresa Pipino, Str. R. Collegio 16, Moncalieri, Torino, Italujo.

Persson-Blokker. La 21-an de junio 1957 geedziĝis sveda samideano Olle Persson kaj nederlanda samideanino Elly Blokker, Möllaregatan 38, Trelleborg, Svedujo.

EN ITALUJO

(*Dekstre:*) La aŭtoritataj kaj malgranda parto de la partoprenintoj de la Esperantaj tagoj organizitaj de la XXIa Bolonja Foiro, fotografitaj en la Esperanto-stando aranĝita de la Bolonja Esperanto-grupo en la Foiro mem. *De maldekstre:* unu el la Bolonjaj Policianoj kun verdstela brakrubando; s-ro Maltoni; la Hon. Dozza Giuseppe, Urbestro de Bologna; Adv. Vaona el Torino; Inĝ. Nanni Otello; la suboficiro de la Policianoj, Negroni Arcangelo; Lia Moŝto Adv. Bagnulo Raffaele.

(*Sube dekstre:*) Estroj de eksterlandaj Delegitaroj ĉe Komerca Centro de la Foiro de Padova vizitas la Esperanto-oficejon. Deĵorantoj s-ro Giovanni Saggiori, delegito de UEA, kaj f-ino Marisa Pulliero bonvenigas kaj klarigas.

(*Sube, maldekstre:*) Pastro P. Modesto Carolfi finis sian 1007an Esperanto-kurson, kiu okazis ĉe la „Legione Carabinieri” en Bologna.





LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

La 13a Internacia Junular-Kunveno en Villeneuve-lez-Avignon

Mi ne scias, ĉu iam la vetero montriĝis pli favora al esperantista kunveno; certe la belega Provenca ĉielo restis dum la tuta semajno (de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto) sennuba en la plej kom-
pleta senco de la vorto. Sennuba la ĉielo, kie varmis la radianta suno, sennuba la kunveno, kie brilis la verda stelo, kaj kie la proksimume 30 partoprenantoj ĝuis belegajn horojn dum la tago kaj dum longaj partoj de la nokto.

La junulara Kunveno estis por ni kva-
zaŭ leciono de historio. Ĉiuloke ni trovis romajn konstruaĵojn: paŝon post paŝo novaj monumentoj surprizis nin kaj pli-
profundigis nian respekton al la Roman-
oj. Estis granda feliĉo por ni, ke per aŭtobuso oni veturigis nin tra la belegaj montoj de Provenco, iama roma provin-
co; alie ni ne estus vidintaj tiom multe da imponaj ruinoj. Dum tiu mallonga semajno oni montris al ni tian amason da vidindaĵoj, ke oni nur povas rakonti pri

la plej gravaj.

La kunveno komenciĝis la 27an post-
tagmeze per akcepto ĉe la urbestro de Villeneuve-lez-Avignon: la vicurbestro, s-ro Laurent, membro de LKK, alportis la saluton de la urbo; ankaŭ la loka Turisma Oficejo esprimis pere de sia prezidanto sian simpatian al la Esperanta movado, kaj la prezidanto de TEJO, Günther Becker, respondis tostante (unufoje oficiale, sed plurfoje poste private, danke al la bonega ĉampano) al la gas-
tama sidejo de la kunveno; la partopre-
nantoj tute simple montris sian danke-
mon, frandante la bongustajn regionajn kukojn. La saman tagon okazis la Inter-
kona Vespero en la Festsalono de la Ur-
bodomo, kiu dum la tuta semajno estis je dis-
pono de la kongresanoj (kaj la ĝene-
rala sekretario de TEJO tenis ĝian ŝlo-
silon).

La postan matenon, t.e. dimanĉon la 28an, en la Festsalono okazis la Solena



La Prezidanto aktivas: juste li estas alektita al la Komitato de UEA.


Malfermo: Günther Becker bonvenigis la kunvenintojn en la nomo de la estraro de TEJO; en la nomo de la LKK parolis ĝia prezidanto, s-ro Roger Motto, kaj sekvis la salutoj de UEA (s-ro William Auld) kaj de la Esperantistaj Junularoj de Danujo (pere de Ethel Hansen), Francujo (Simone Motto), Germana Demokrata Respubliko (Giso Brosche), Germana Federacia Respubliko (Irmela Giessner), Italujo (Carlo Minnaja), Norvegujo (Gunvor Jorgensen), Sarlando (Günther Becker), Skotlando (William Auld), Svedujo (Kerstin Olsson), kaj s-ro Vittorio Sossi portis la saluton de la antaŭa redaktoro de „La Juna Vivo”, s-ino Elisabeth Burgler. La solenaĵo fini-
ĝis per la festparolado, en kiu la ĝene-
rala sekretario de TEJO, Nicola Minna-
ja, akcentis la signifon de la internaciaj junularaj renkontiĝoj en la Esperanta movado.

Posttagmeze la kongresanoj vizitis la kastelon de la Papoj, mirindan mezepo-
kan konstruaĵon superregantan la urbon Avignon, muzeon Calvet kaj la aliajn ĉefajn vidindaĵojn de Avignon.

Dum la postaj tagoj la distraj eroj alternis kun la laborkunsidoj.

Unu el niaj ekskursoj per aŭtobuso kondukis nin al la mondfama belega „Pont du Gard”, akvedukto, kium konstruigis la provincestro Agrippa antaŭ du jarmiloj, por porti akvon trans la riveron Gard al Nîmes. En ĉi tiu antikva urbo la partoprenantoj de la IJK povis admiri bonege konservitan amfiteatron, kiu ege imponis al ni, kaj la Romanoj grimpis pluan ŝtupeton en nia estimo. Jes; kaj aparte ĝojiga, eĉ kortuŝa, estis la fakto, ke la gvidisto en tiu amfiteatro flue parolis Esperanton.

(Koncerne gvidistojn mi volas aldoni



Ĉe la imponaj stalaktitoj kaj stalagmitoj en la belegaj grotoj de Aven d'Ornac.

kelkajn vortetojn: en la kastelo de Uzès, ekzemple, la gvidisto montris al ni pentraĵojn de la dukoj loĝintaj tie; sed ne nur la bildojn de la dukoj, ankaŭ tiujn de iliaj edzinoj, fratoj, bofratinoj, filoj ktp. li prezentis al ni, kaj dum pli ol unu horo raportis — oni povas imagi, kiel interese por ni — pri iliaj komplikaj parrancecaj rilatoj kaj pri specialaj okazintaĵoj en iliaj familioj!)

Dum la dua tuttaga ekskurso ni vizitis la interesajn subterajn grotojn de Aven d'Ornac, kie ni povis admiri stalaktitojn longajn pli ol 20 metrojn. Poste la aŭtobuso rapide nin portis al la malnova triumfarko de Orange, kiu montras scenojn el la bataloj inter Romanoj kaj Keltoj. La tiea roma teatro estas en tiel bona stato, ke oni povas ankoraŭ prezenti teatraĵojn.

Dum la vesperoj ni ĝojis reveni en la ombran urbodomon, kie ni kantis kaj dancis. Tie ni ĝuis kolorfilman prezentadon pri la kongresoj en Bolonjo kaj Kopenhago, kaj ofte ekkriis iu, kiu rekonis sin mem aŭ konaton.

En la sama semajno disvolviĝis en Avignon la Teatra Festivalo, kaj la LKK kaptis la maloftan ŝancon ĝuigi al ni en la belega mezepoka korto de la palaco de la Papoj la mondkonatan dramon de Eliot „Murdo en la katedralo” kaj la vervan spiriton de la komedio de

Beaumarchais „La edziĝo de Figaro”. Alian vesperon ni estis gastoj de la urbestro de Villeneuve ĉe la bonega prezentado de „Georgo Dandin” fare de la Comédie de Provence. Bedaŭrinde la teatraĵoj estis ludataj en franca lingvo, sed tiel bona estis la mimado, ke ankaŭ ĉiuj eksterlandanoj povis sufiĉe bone kompreni.

Dum la literatura vespero Carlo Minnaja gvidis nin tra la Esperanta literaturo, kaj donis kelkajn ekzemplojn pri originalaj kaj tradukaj verkoj, reliefigante la rolon de la ĉefaj nuntempaj eldonaĵoj.

Ĝis nun la leganto povus kredi, ke ni nur amuziĝis. Ho, ne! Ni ankaŭ laboris. Dum la du laborkunsidoj oni pritraktis la ĉefajn problemojn de TEJO, kaj precipe la statuton, la 14-an Internacian Junular-Kunvenon kaj la Skisemajnojn. Pri la venontjara kunveno oni decidis akcepti la inviton de Homburg (Sarlando), ĉar tiu loko estas taŭga ĉu pro la proksimeco al Mainz (kie okazos la Universala Kongreso), ĉu pro la malaltaj kostoj. Pri la skisemajnoj oni decidis okazigi ilin ankaŭ dum venonta vintro (detaloj aperos en la novembra numero).

Alian tagon okazis interesa oratora konkurso kun libera temo, kiun partoprenis sep gejunuloj. La premion gajnis Carlo Minnaja (Italujo) pritraktante la

temon „La naskiĝo de la italaj lingvoj kaj literaturo”; honorajn menciojn ricevis Nicola Minnaja (Italujo) kaj Irmela Giessener (Germanujo). La juĝantaro laŭdis la partoprenantojn kaj ĝojis pri la vere altnivelaj paroladoj, kiujn la plej multaj el la konkursantoj tute improvizis.

Vi povas imagi, ke ni tre ŝvitis tie en Sudfrancujo, ne nur pro varmego, sed ankaŭ pro la „intensa laboro”; tial ni ofte sopiris banon por refreŝiĝi. Sed nur dufoje ni havis tempon por naĝi. Sidante apud la akvo ni kantis diverslandajn kantojn en nia lingvo, tiel ke la aliaj homoj mirplene aŭskultis tiun por ili strangan, neniam aŭditan idiomon. Do eĉ dum banado ni diskonigis Esperanton.

Kiel vi vidas, la 13a IJK sukcesis: rondo malgranda ĝuis eksterordinaran semajnon en vere esperantista medio danke al la LKK, konsistanta el s-ro Roger Motto, s-ro Laurent, s-ino Blary (organizintino de la belega ekskurso al Nîmes) kaj f-ino Bonnafous; verŝajne pli granda kongresanaro ne estus kapablinta trovi tian sinceran agordon kaj vivi tiel impresoriĉan renkontiĝon, en kiu ne perdiĝis la unuopaj kontribuoj en la perfekta kunfandiĝo.

Ni esperas, ke nia 14a en Homburg estos same bela, kaj ke ankaŭ multaj el vi, karaj legantoj, venos tien!

Frank Giessner

S.A.T. KONGRESO EN ROTTERDAM, NEDERLANDO

Partoprenis la SAT-kongreson, okazintan, same kiel la U.K., de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto, proksimume 800 gekongresanoj el 20 landoj.

En la Interfratiĝa Vespero oni ĝuis i.a. bonegan prezentadon de geknaba grupo el Jugoslavio.

Kiel en la U.K. en Haarlem, ankaŭ nun la nederlanda ĉefministro, D-ro W. Drees, iama lernanto de Andreo Cseh, alparolis la kongreson en tre bona Esperanto dum la Malferma Solenaĵo kaj diris memorindajn vortojn pri la neceso de neŭtrala simpla lingvo. Ĉeestis la Malfermon oficiala reprezentanto de la belga registaro. Ne mankis pluraj ĵurnalistoj. Partoj de la programo, kiu enhavis ankaŭ kelkajn muzikaĵojn, kaptitajn per sonbendoj, estis poste aŭdigataj en la nederlanda radioprogramo.

Je lundo okazis oficiala akcepto en la urbodomo. Alparolis la kongresanaron la vic-urbestro, skabeno J. U. Schilthuis.

En la kadro de la kongreso estis aranĝitaj Laborista Universitato kun prelego de D-ro W. Roelofs kaj tre interesaj vizitoj al pluraj fabrikoj kaj entreprenoj, i.a. al ŝipkonstruejo, bierfarejo, al la plej granda laborista gazeto, al seruminstituto, energifabriko ktp.

Al la kongreso estis ligita ankaŭ Geknaba Kongreso. Radioelsendo farita per sonbendoj pri ĝi vekis multe da interesiĝo.

Bone funkciis la Gazetara Servo, tiel

ke la roterdamaj ĵurnaloj kontentige raportis pri la okazaĵoj.

Konata nederlanda balettrupo „Skapino” prezentis bonegan programon en la Kultura Vespero, okazinta en la halego de la Zoologia Ĝardeno. Distris la kongresanojn plue duontaga ekskurso al la marbordo kaj tuttaga ekskurso al Arnhem, la konata progresema urbo koncerne eŭropan integriĝon kaj lingvajn problemojn. Delegacio de la kongreso estis akceptata de la urbestro.

En pluraj laborkunsidoj estis traktataj la internaj organizaj aferoj.

Entute la kongreso estis tre bonsukcesa. Ni nur bedaŭris, ke en la urbo mem malmulte estis videbla pri Esperanto. Eĉ sur la aŭtobusoj kaj ŝipoj de la ekskursoj mankis flagoj aŭ surskriboj. Cetere, la organiza komitato sendube meritas laŭdon pro la bona funkciado de la kongreso.

Estis decidite ke en 1958 la SAT-kongreso okazos en Helsinki.

J. G.

Beneluksa Kongreso en Eindhoven, Nederlando, Pentekosto 1957

La Beneluksaj kongresoj jam komencas fariĝi tradiciaj en la malaltaj landoj. Okazis je Pentekosto la kvina sinsekva. Fakte, la „Lukso” en la nomo estas pura luksaĵo, ĉar luksemburgaj esperantistoj ne troviĝas en tiuj kongresoj, nek, ŝajne, en Luksemburgo mem. Eble, havus sencon meti en la tagordon de unu el la venontaj Beneluksaj Kongresoj la de-

mandon, kiel la ĉirkaŭaj landoj kreu movadon en tiu malgranda sed grava peceto de eŭropa tero, kiu havas inter siaj limoj i.a. la sidejon de la sola supernacia instanco ĝis nun ekzistanta en la mondo, tiun de la Karbo- kaj — Ŝtalo-Komunumo.

Sed abundis la belgaj kaj nederlandaj partoprenantoj inter la gaja kongresanaro, kiu tute plenigis la grandan salonon de la hotelo Limburgia, sufiĉe taŭga kongresejo, sabaton vespere por la interkonatiĝa vespero. Eindhoven signifas Philips kaj la ĉeesto de la mondfamaj fabrikoj sentiĝis dum la tuta kongreso, ĝi aŭdiĝis en la oficialaj paroladoj, ĝi vidiĝis en la de ĝi disponigitaj filmoj prezentataj dum du vesperoj, en la donacetoj por la loterio, dum la ekskursoj tra la urbo. La urbestro afable akceptis la kongresajn oficialulojn kaj esprimis memorindan opinion pri la utilo de la internacia lingvo, al kiu digne respondis la kongresa prezidanto S-ro H. J. Blokker. En la vesperaj aranĝoj estis diritaj multaj salutvortoj, i.a. de S-ro Helmuth el Usono, jam bone konata al eŭropaj esperantistoj en sennombraj lokoj de li vizititaj en la pasintaj monatoj. En la amuzaj programoj inter multaj filmoj kaj kelkaj muzikaĵoj subite surprizis sprita prezentado de lerta juna magiisto esperantista. Dumtage la landaj asocioj havis siajn jarkunvenojn. La lastan tagon okazis bone aranĝita ekskurso en belega regiono de tiu ĉi ĉarma suda provinco nederlanda. La venonta Beneluksa kongreso okazos en la belga loko Charleroi.

M. H. V.

Niaj Konkursoj

Raporto pri Literatura Vetludo N-ro 4

Ke ĉi tiu vetludo ne sukcesis, certe estas la kulpo de la proponinto, kiu elpensis ideon eble agrable tiklan — recenzon de tutesperanta filmo farita de granda film-kompanio — sed por plenumo tro malfacilan. Venis nur du partoprenoj. **Lipharulo** elektis temon tro internan por starigi vere filmikajn problemojn: la Unuan Universalan Kongreson. Lia recenzo impresis kvazaŭ aktuala gazetraporto pri la okazo, ne kiel film-kritiko. **Steloj sen brilo** portis al la tasko fortan imagpovon: li imagis, ke kvar eŭropaj popoloj kuniĝis por filmigi la verkon de Edmondo de Amicis "Kverko kaj floreto", kaj li bone elpensis la plenumon de tia kompleksa entrepreno. Bedaŭrinde lia entuziasmo pri sia propra ideo kondukis al tio, ke li ĉiun parton nur laŭdis; ankaŭ lia lingvorego lasis ion deziri. Kun bedaŭro mi ĉifoje detenas min atribui premion.

Raporto pri Literatura Vetludo N-ro 5

Ni postulis:

A. Verku poemon adresitan al mond-

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Oficiala Servo de UEA

Jam pasis la somera libertempo, dum kiu kelkaj el ni, la plej feliĉaj, havis okazon parole uzi Esperanton, ĉu vojaĝante en eksterlando, ĉu renkontante en la propra lando alilandajn samideanojn. Fakte, Esperanto estas pli parolata dum la somero, ol dum la tri ceteraj sezonoj de l' jaro kune. Sed kiam venas la aŭtuno, la esperantistoj komencas sian laboron pli aktivan: instruado, propagando, kaj la Zamenhofa lingvo, malpli parolata ol dum la somero, iĝas pli legata kaj pli skribata ol en tiu sezono. Ĉiu esperantisto devas pliperfektigi per ĉiutaga uzado de nia lingvo kaj apud la legado de gazetoj kaj libroj Esperantaj nepre ne devas manki la esperantlingva korespondado. Ĉiu komencanto pliprofundigu sian konon de la lingvo per tiu rimedo, kaj ĉiu progresinto alprenu komencantan korespondanton por kuraĝigi lin kaj plibonigi (per modela stilo, konsiloj, eĉ korektoj de liaj leteroj) lian Esperanton kaj tiel iĝi lia gvidanto en la Esperanta mondo. Ne forgesu, ke komencanto, kiu havas okazon uzi la lingvon nek parole nek skribe, estas forlasonta niajn vicojn,

diplomatoj aŭ regnestroj en formo de rondelo, soneto, dektrio (dek tri tercino-versoj) aŭ balado.

B. Prozemuloj estas invitataj verki du telegramojn al diversaj mondfamaj personoj. La komencliteroj de ĉiu telegramo devas elliteri la nomon de la adresato.

Neniu sukcesis doni vekton de du egalbonaj telegramoj.

Lipharulo trafis per rusa voko al Mac-Millan: **Malarmado Angla Certe Min Interesas Laboru Limigi Armilojn Nukleajn**: Dániel Zánkai per unu al Shakespeare: **Shakespeare Hadeso — Abundajn Kaj Ekstremajn Spertojn Promesas Epoko Atoma. Reviviĝu! — Eŭropa.**

Lipharulo sendis ankaŭ soneton, kiu gajnus ĉeflokon, se li estus evitinta kelkajn teknikajn difektojn. Jen kiel debutas lia alparolo „al Potenculo”:

Vi estas la mastro, regnestro potenca,
vi trudas laŭplace imposton, pagdaton.
Vi agas sen mild' per metodo

scienca...

Kompatu, pro Dio! mizeran regaton.

Jirí Korínek prezentis soneton, en kiu li perfekte plenumis, kion li entreprenis.

Poul Thorsen rondelis pri temo pli vasta, kaj **Jozefo** sonis potence per dektrio.

Ambaŭ havas grandajn meritojn. Am-

kaj estas tiel grave (eble eĉ pli) konservi lernintojn ol akiri novajn lernantojn. (Kiom da personoj diras al ni: „Mi iam lernis Esperanton” kaj eĉ ne kapablas saluti en nia lingvo!) Plej bona garantio estas bona korespondanto. Tiu bona korespondanto por iu nuna novulo estu vi, leganta samideano!

Petante adreson de korespondanto, bonvolu indiki al mi ankaŭ informojn pri vi mem (almenaŭ: sekso, aĝo, profesio), ĉar la personoj, kun kiuj mi vin interrilatigos, havas ankaŭ siajn proprajn dezirojn. Ne forgesu aldoni ankaŭ unu internacian respondkuponon por ĉiu petata korespondanto. La klarigo de tiu postulo mia troviĝas en la Juli-aŭgusta numero de „Esperanto” (p. 121). Francoj sendu du 15-frankajn poŝtmarkojn anstataŭ respondkuponon. Mi ne povas respondi al tiuj, kiuj nenion sendas. Mi nur transdonos iliajn adresojn.

Plej multajn tuj disponeblajn adresojn mi havas nun en Finnlando, Italujo, Bulgarujo, Hungarujo, Francujo, Pollando, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakujo, Sovet-Unio (Estonujo) — kaj en Svedujo nur infanojn.

Ĉiujn petojn sendu, kiel antaŭe, al mia franca adreso:

DANIEL LUEZ

LAON (Aisne)

Francujo

baŭ havas manketojn: **Jozefo** en versoj 2 kaj 3, **Thorsen** per la eraro meti la malfortakcentajn „sia” kaj „ĝia” sur ĉefakcentajn lokojn. Mi sentas, ke li partoprenis rapideme (lia teksto portas lastmomentajn ŝanĝojn), kaj ke kun pli da atento li estus povinta formi bonegan rondelon kun perfekta trasvingo. Mi rekomendas premion je sep guldenoj al **Jirí Korínek**; al **Jozefo** kaj **Thorsen** po 5 guldenoj.

(Statisto: teatra figuranto. **Stiri**: direkti veturilon. **Pado**: vojeto en kamparo.)

La statistoj al ŝtatistoj

Grandaj moŝtoj ĉe l' stiriloj
de la monda okazad'
sub diversaj stelobriloj
sur emblem' de via ŝtat',

kial viaj ĉirkaŭiroj
de al-paca rekta pad'?
Konsideru, gvidaj viroj,
kion servas ni sur plad'.

Malpli trudu kun ruzem',
ja ne nur vi pravas mem;
kaj kun tolerem' pli granda

pensu eĉ pri nia ilo
sen mensog' de trompa brilo:
Verda Stelo Esperanta!

Jirí Korínek

Al ĉiuj regnestroj

Sinjoroj, kial ludi pri l' konceptoj
Kaj buŝe maĉi idealajn vortojn? —
De homarism' ne estas vi adeptoj;

Vi amasigas viajn „pac”-kohortojn
Por vin „defendi” kontraŭ „agresuloj”,
Kaj tiel vi direktas niajn sortojn —

Ni: ĉiulandaj simplaj molekuloj.

Kaj dum ĉi ĉio via ĵur' sonoras:
Ke vi sopiras breĉojn tra l' nebuloj.

Sed tiuj viaj diroj ne valoras.
La pruvo? Vi parolas pri konkreta
Emo al kompreniĝo, sed ignoras

Mondlingvon, kiu staras vive preta!

Jozefo

Emfaze

La monddiplomatojn mi vokas
el sia fatala rutino.
Dum fungosimila ruino
alŝvebas, la hom' epilogas.

Atomgeneraloj arogas
pri plena amas-elimino.
La monddiplomatojn mi vokas
el sia fatala rutino.

La nuda ciniko pli ŝokas,
ol ĝia detrua destino
minace al ĉiuj per fino,
dum blinde ni paktas kaj blokas.

La monddiplomatojn mi vokas.

Poul Thorsen

J. Varty

1. Reciproka Reklamado

La Esperanta Societo de Sidcup kaj Nordokcidenta Kento estas malgranda aro de personoj — proksimume 20. Dum unu Septembro la Sekretario devis forsendi 300 poŝtaĵojn kaj li kaj aliaj disdonis milojn da folietoj.

Tiuj laboroj ne havis grandajn rezultojn, do necesis elpensi kiamaniere atingi pli vastan publikon per malpli da laboro.

La solvo estis: proponoj de senpagaj reklamoj en la bulteno de la Societo por



lokaj butikoj k.c. kontraŭ promeso de iaspeca reciproka reklamado.

Butikoj kaj trinkejoj povas utiligi multajn folietojn kaj la plej ofta promeso estis meti folietojn sur la servotablo por ke la publiko forprenu ilin.

Por ke la folietoj restu netaj, S-ro Gardener el Bromley fabrikis specialajn skatolojn kun la frazo sur ili „Please take one” („Bv. preni ekzempleron”) kaj tiaj skatoloj multe helpis la kampanjon. La bildo helpas al tiuj kiuj volas sekvi ĉi-tiun ideon.

J. A. COX

Foto: G. B. WARREN

Impona manifestacio de lerneja junularo

Por la fino de lerneja jaro la Slovenia Esperanto-Ligo kun la Junulara sekcio kaj helpe de Instituto de Esperanto aranĝis renkontiĝon de gelernantoj, lernintaj Esperanton dum la jaro.

La unuan ekskurson iniciatis la junularo el Maribor okaze de la festo de junularo la 26-an de majo, prezentinte ankaŭ kulturprogramon. Post la aranĝo salutis la gelernantojn la sekretario de la Ligo M. Dobcnik, por Instituto J. Kozlevčar, por E-societoj Ljubljana kaj Rog. Slatina Tone Logar kaj Martin Tovornik.

La dua renkontiĝo de junularo okazis la 1-an de junio en Postojna, kaj parto-

prenis ĝin la lernantoj el Koper, Postojna kaj Ljubljana, kaj delegacioj en Celje kaj Maribor, entute 168 gelernantoj. La lernantojn akompanis ok esperantistaj instruistoj, alvenis ankaŭ la prezidanto de la Ligo k-do P. Zlatnar, sekr. M. Dobcnik kaj afergvidanto de la Instituto J. Kozlevčar. El Ljubljana alveturis 70 lernantoj, kiujn atendis antaŭ la popollernejo en Postojna 40 tieaj infanoj, kaj antaŭ la groton alveturis per aparta aŭtobuso 53 lernantoj el Koper. En la koncerta salono de la groto la lernantoj el Postojna preparis por la gastoj surprizon: sub la lerta gvidado de instruistino S. Ivancic ili prezentis kortuŝan programon. Knabelino Tatjana Čermelj salutis esperantlingve la ĉeestantojn; gea ĥoro kantis en Esperanto diversajn kantojn kaj ĥordeklamojn. Post la trarigardo de la groto okazis komuna fotografiĝo. Post tagmanĝo la lernantoj vizitis „Predjamski grad”, kie la grupoj en libera naturo prezentis apartan programon.

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas: Dro V. Faigl, Zlonice,
Ĉeĥoslovakio


Post 30 jara interrompo ni ree malfermas ŝakan rubrikon en nia revuo. La rubriko, aperinta en nia revuo ek de 1921 ĝis 1927, ĝuis aktivan partoprenon de 170 samideanoj el 35 nacioj. Ĉu ni povas esperi, ke ni povos atingi ankoraŭ pli grandan subtenon? Nia rubriko aperados regule en ĉiu dua numero kaj alportados partiojn, problemojn kaj ĉefe informojn el esp. ŝaka vivo. Ni petas, kunlaboru kun ni kaj sendadu al ni viajn kontribuojn kaj proponojn. Atentigu pri reapero de nia rubriko ĉiujn esp. ŝakistojn.

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia preparata

Kelkaj aktivuloj de nia ŝaka vivo traktas jam longe pri fondo de esp. ŝaka

Problemo n-ro 1.

J. Aizikowicz, Haifa, Israelo.



JOSEPHINE BAKER KAJ ESPERANTO

La tre konata franca artistino Joséphine BAKER organizis la 7-an de Julio 1957 Kontraŭracistan Kongreson en sia „Vilaĝo de la Mondo”.

Ni devas konigi al nia samideanaro, ke tiu artistino estas tre favora al Esperanto kaj ŝi dungis infanvartistinon, kiu scipovas nian lingvon. La rimarkinda afero de tiu vilaĝo estas la fakto, ke Joséphine BAKER adoptis naŭ infanojn de diversaj rasoj kaj ŝi zorgas konstante por la edukado kaj vivado de tiuj infanoj.

Al tiu kongreso ĉeestis Angloj, Ĉinoj, Germanoj, Hispanoj kaj Nederlandanoj kaj, kompreneble, multaj Francoj inter kiuj kelkaj samideanoj de la regiono.

Ni petas niajn samideanojn de la tuta mondo sendi, sur simpla poŝtkarto, gratulojn al Joséphine BAKER, „Les Milandes”, près SARLAT (Dordogne).

organizo. En kunveno, okazinta en 1956 en Kopenhago decidis la ĉeestintaj samideanoj elekti preparkomitaton, kies tasko estas priesplori le eblecon de fondigo de tia organizo. La celo de fondota ligo estas: 1. grupigi ĉiujn ŝakistojn, kiuj konas nian lingvon kaj ebligi al ili amikajn rilatojn, 2. propagandi Esperanton inter ŝakistoj en tuta mondo. Oni priesploras eblecon eldonadi ŝakan revuon en Esperanto.

La preparkomitato funkcios provizoregis solvo de ĉiuj organizaj demandoj — poste oni alpaŝos al oficiala starigo de la ligo. La preparkomitato petas ĉiujn esp. ŝakistojn, ke ili sendu siajn adresojn por registro al gvidanto de nia rubriko, kiu estas sekretario de la preparkomitato.

Korespondŝakaj turniroj.

La preparkomitato de EŝLI volas renovigi ŝakajn korespondturnirojn, kiujn en unuaj postmilitaj jaroj organizis Esp. fako de ICCF. Interesuloj, skribu al s-ro Jean Duthilleul, 35 Rue de Bayeux, Caen, Francujo.

Oni organizos turnirojn kun po 7 partoprenantoj en ĉiu grupo / preferu ĉiu el alia lando /. La preparkomitato jam interkonsentis kun ICCF / Internacia korespondŝaka federacio / ke niaj turniroj estos organizataj en samaj grupoj, kiel la turniroj de ICCF kaj klasifiko atingita en niaj turniroj validos eĉ por ICCF.

Certe vin interesos, ke . .

.. EŝLI havas jam adresojn de 340 esp. ŝakistoj el 36 landoj.

.. ankaŭ inter niaj blindaj samideanoj estas multaj ŝakistoj, kun kiuj EŝLI volas kunlabori.

.. jam en 1909 aperis ŝaka libro en Esperanto: Paluzie: Sesdek ŝakproblemoj.

En ĉiu rubriko ni publikigos unu problemon. La solvon de tiu ĉi sendu al gvidanto de la rubriko ĝis 31.1.1958.

Mortis F. V. Lorenz

La plej malnova esperantisto en la mondo, ankoraŭ vivanta en la komenco de 1957, estis Francisco Valdomiro Lorenz, kiu mortis en Porto Alegre, Rio Grande do Sul, Brazilo, je la 1-a post-tagmeze de 24 de majo 1957.

Li naskiĝis en la malgranda vilaĝo Zbislav, proksime de la urbo Tĉĉaslav, la 24-an de decembro 1872, kaj esperantistiĝis en 1887. En 1890 li eldonis sian unuan libron sub la nomo „Plena Lernolibro de Esperanto por Ĉeĥoj”. Kvankam tre malriĉa kaj sen rimedoj por studado, li fariĝis eminenta lingvisto kaj rimarkinda poligloto, kiu posedis ĉirkaŭ 80 lingvojn.

En Brazilo li loĝis dum ĉirkaŭ 60 jaroj en malgranda terkultura kolonio nomita Sankta Feliciano.

Inter liaj unua kaj dua libroj forpasis 51 jaroj, ĉar li estis tro malriĉa por el-

doni proprakoste kaj dum tiu longa tempo li tute ne trovis eldoniston por Esperantaĵo en la lando, tial li nur kunlaboris en revuoj. Nur de post kiam la Brazilia Spiritisma Federacio, en 1937, komencis eldonadi librojn en Esperanto, oni petis lian kunlaboradon kaj li preparis sian duan libron sub la titolo „Diverskolora Bukedeto”, kolekto da poemetoj el 40 lingvoj, kiu aperis en 1941. En 1942, aperis lia mirinda traduko de „Bhagvad-Gitā”, el la sanskrita kaj en la sama ritmo de la originalaj versoj. En 1944 aperis la volumo „Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo”, da poemoj mediume ricevitaĵoj de li mem kaj aliaj de li tradukitaĵoj el la verko „Par-naso de l' Transmondo”, de mediumo Francisco Cândido Xavier. Lia lernolibro „Esperanto sem Mestre” (Esperanto sen Instruisto) jam atingis la 5-an eldonon.

Lia lasta verko en Esperanto estis

„Antologio de Brazilaj Poetoj”, kies manuskripto jam de kelkaj jaroj estas ĉe Brazilia Esperanto-Ligo kaj estos sia-tempe eldonita.

NEKROLOGO

Cociña. En Habana, Kubo, mortis la 22-an de julio 1957 s-ro Heriberto Cociña, dum multaj jaroj delegito de UEA.

Gscneidel. La 5-an de julio 1957 forpasis s-rino Hedwig Gscheidel, dum multaj jaroj delegito de UEA en Crailsheim, Germanujo.

Perret. En julio mortis en Lyon s-ro Louis Perret, aŭtoro de „Enciklopediaj Kajeroj de Esperanto” kaj unu el la gvidantoj de la Esperantista societo en Lyon.

Plum. La 9-an de julio 1957 forpasis s-ro M. Plum en Waubach, Germanujo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO.

La 1-an de septembro 1957.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aŭgusto kaj ankaŭ por komparo, je la fino de aŭgusto 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	11601	13289
Individuaj membroj		
MJ	884	786
MA	4273	5387
MS	722	665
Pat.	9	5
DM	292	299
HM	54	52
JMJ	—	14
JMA	—	96
	6234	7304
	17835	20593

NOVAJ ĈEFDELEGITOJ

Molera, Ramon, Calle Hospital 13, Moyá, Hispanujo.

Rousseau, Henri, Auberge de la Jeunesse, 34 rue de la Marne, Rabat, Maroko.

Skyberg, Alfred, Østensjøveien 118, Oslo, Norvegujo.

DELEGITOJ

Aŭstralio

Nowra FD (aeronaŭtiko): vakas.

Belgujo

Gent FD (ŝu-kaj-vest-tranĉado): vakas.

Francujo

Aulnay-sous-Bois D: vakas.

Saint-Pierre-des-Corps D: vakas.

Terrebourg de St. Angeau FD (instruado): F-ino Madeleine Laporte, instruistino.

Germanujo

Düsseldorf JD: F-ino Helga Odermath, lernantino de fremdlingva lernejo, Cannstätterstr. 7.

Wiesbaden FD (poŝto): S-ro Leo Jolliet, emerita poŝtoficisto, Assmannshauser Str. 8 a.

Italujo

Reggio Calabria D: vakas.

Roma JD: S-ro Giancarlo Guarnieri, studento, Via Giuseppe Palumbo 1.

Izraelo

Mišmar Hašiv'A FD (vegetarismo): S-ro Jehezkel Dorn, ĝardenisto, Doar Bet-Dagon.

Japanujo

Kumagaya D: S-ro Ikuo Omata, instruisto de angla lingvo, 777 Hakoda.

Jugoslavio

Sarajevo FD (muziko): S-ro Bozidar Trudic, docento de muzika akademio, Zagrebacka 13a/I.

FD (turismo): vakas.

Zagreb FD (turismo): S-ro Jelena Manojlovic, pensiito, Trg Francuske Respublike 3/II.

Pollando

Bedzin FD (komerco: importo kaj eksporto): S-ro Henryk Palica, komercisto, Aleja Spacerowa 10/16.

Sobieszów D: S-ro Tyburcjusz-Kazimierz Tyblewski, filologia studento, Cieplicka 64.

Port. Orienta Afriko

Nampula (Moçambique) D: S-ro Horácio de Jesus Henriques, presisto, Caixa Postal 123.

Svislando

Neuchâtel JD: vakas.

NOVAJ KOMITATANOJ

Becker, Gunther, Hauptstrasse 536, Frankenholz, Sarlando.

Lapenna, S-ino Emilija, Nova Ves 32, Zagreb, Jugoslavio.

Popovic, Prof. B. Zagrebacka 12, Sarajevo, Jugoslavio.

Thierry, Mag. Jean, 26 rue Molière, Paris 1, Francujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

- 616 Grahovac, S-ro Ilja, Melbourne, Aŭstralio.
 617 Machado, S-ro J. Custódio, Tupaci-guara, Brazilo.
 618 Silva, S-ro Wladimir S., Rio de Janeiro, Brazilo.
 619 Timponi, D-ro M., Rio de Janeiro, Brazilo.
 620 Zubieta, S-ro Majin, Rio de Janeiro, Brazilo.
 621 Jones, S-ro D. R. T., London, Britujo.
 622 Prus, D-ro F. de, Falkirk, Britujo.
 623 Bonafous, F-ino M., Villeneuve des Avignon, Francujo.
 624 Lagarde, S-ro L., Paris, Francujo.
 625 Lagrange, S-ino Erika, Saint-Brice, Francujo.
 626 Heriau, S-ro M., Boulogne s. Mer, Francujo.

- 627 Grabau, F-ino Maria, Hamburg, Germanujo.
 628 Vogelmann, S-ro Bruno, Crailsheim, Germanujo.
 629 Alavedra, S-ro V., Tarrasa, Hispanujo.
 630 Fracalossi, S-ro A., Trento, Italujo.
 631 Wong, D-ro C. S., Penang, Malajo.
 632 Soma, S-ro Arne, Sandnes, Norvegujo.
 633 England, S-ro G. Q., Nandi Fiji, Novzelando.
 634 Fejde, S-ro M., Nässjö, Svedujo.
 635 Linnander, S-ino Siri, Stockholm, Svedujo.
 636 Östman, S-ro Ossian, Husum, Svedujo.
 637 Greuert, S-ino K., Bellinzona, Svislando.
 638 Pray, S-ro Bruce R., Detroit, Usono.
 639 Spant, S-ro Gunnar, New York, Usono.

- 640 Alves, S-ro Carlos O. de A., Bahia, Brazilo.
 641 Malamam, S-ino Maria D. Stela R., São Paulo, Brazilo.
 642 Marczincki, S-ro Waldemar, São Paulo, Brazilo.
 643 Palmério, S-ino Maria Dolores, Campo Grande, Brazilo.
 644 Vieira, S-ino Yayá, Saldanha Marinho, Brazilo.
 645 Rizzo, D-ro Pietro, Catania, Italujo.
 646 Larsson, S-ro Carl, Sala, Svedujo.
 647 Lind, S-ro E., Trollhättan, Svedujo.

DONACO AL LA GENERALA KASO

N. A. Lyes, 13.85 gld.

M. H. VERMAAS
Direktoro C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 31an de aŭgusto 1957

13.	Britujo	7351	6853	93,23
14.	Brazilo	6985	5895	84,40
15.	Norvegujo	2113	1470	69,57

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	2016	3030	150,29
2.	Danlando	1910	2718	142,30
3.	Nederlando	4894	5442	111,19
4.	Italujo	3620	3945	108,97
5.	Francujo	6575	7140	108,59
6.	Jugoslavio	3563	3715	104,26
7.	Germanujo	6515	6760	103,76
8.	Finnlando	2687	2755	102,53
9.	Svislando	1910	1935	101,30
10.	Hispanujo	2092	2095	100,14
11.	Svedujo	6895	6685	96,95
12.	Belgujo	1952	1833	93,90

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Aŭstralio	1025	1218	118,82
2.	Aŭstrujo	1400	1495	106,78
3.	Sudafriko	230	225	97,83
4.	Argentino	745	725	97,32
5.	Novzelando	942	905	96,07
6.	Japanujo	1210	1105	91,32
7.	Portugalujo	580	520	89,66
8.	Urugvajo	325	290	89,23
9.	Kanado	500	440	88,—
10.	Izraelo	290	230	79,31
11.	Islando	405	295	72,84
12.	Maroko	1061	450	42,41

ANONCETOJ

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Britujo, Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Bulgarujo, Finnlando. Skribu, indikante **viajn** sekson, aĝon, profesion al: Daniel LUEZ, LAON (Aisne), Francujo kaj enmetu unu respondkuponon por ĉiu pe-tata korespondanto.

La nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu trakta-tojn senpage. Aldonu, se eble, resp. ku-ponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Kristana kulturlaboro en nia tempo, ak-tuala verketo de sveda ĉefredaktoro,

radiokomentisto kaj beletra historiisto Erik Hj. Linder, estas ĵus aperigita en bona traduko. Konvena por individua studo kaj grupa diskuto. 32 p. por 1 sv.kr. aŭ 2 resp. kup. afrankite ĉe Es-peranto-Missionen, Klackavägen, Nora stad, Svedujo.

Gramofondisko nerompebla: La Espero, Ĉeriz' Tempo, Al la Fontano Klara, Adiaŭ (Schubert). Piano kaj kanto. Yvette Mathy-Josse, Marguerite San-treuil. 1200 fr.fr. (inkl. afrankon), Ch. P. II 652-37, Porte Océane, 21, rue de Berne, Paris 8.

Fotoreportisto de taggazeto deziras inter-ŝanĝi fotografiajn. Z. Kosycarz, ul. 20 Pazdziernika 806, Sopot, Pollando.

Nacia Muzeo de Presarto, Lyon. La Mu-zeo aĉetas ĉiujn antikvajn objektojn pri presarto, presaĵojn, metilojn, librojn. Se oni preferus ŝanĝigus kontraŭ belajn silkaĵojn kompareblajn. Skribi al Mau-rice Audin, Direktoro, 62 rue Pierre-Corneille, Lyon, Francujo.

Malhelpita iri al Marsej' en la komenco de la monato, Ludoviko Povrom tre be-daŭras, ke li ne ĉeestis la 42-an Univer-salan Kongreson. Li estas tre kortuŝita de la kolektiva poŝtkarto, kiun sendis al li gekongresanoj. Al ĉiuj dankon kaj since-rajn bondezirojn.

Interesiĝu pri esperantaj poŝtmarkoj, spe-cialan albumon eldonis André Ribot, Es-peranto, Marmande, Francujo.

Novaj Esperantistoj dez. korespondi tut-monde, interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝt-markojn. Antaŭdankas peranto: Erik Bengtson, Ljungholmsvägen 19, Falken-berg, Svedujo.

40-jara sveda laboristo deziras korespon-di pri literaturo, arto kaj religio. S-ro Ar-ne Begtsson, Åbybergsgatan 32, Mölndal, Svedujo.

Kontraŭ 100 diversaj p.m. uzitaj aŭ neu-zitaj de via lando, sendos egalkvanton de nederlando. K. Zwiers, Middenstraat 37, Slidrecht, Nederlando.

Aperos antaŭ la Tago de la Libro (15a de decembro)!

ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Verkoj de Chaucer, Spenser, Shakespeare, Milton, kaj multaj aliaj mondfamaj aŭtoroj en Esperanta traduko.

Redaktoroj:

WILLIAM AULD kaj RETO ROSSETTI

en kunlaboro kun plej kompetentaj tradukintoj pretigis la manuskripton, kiun eldonos

La Eldona Fakto de UEA

Ĉi tiun belan kaj valoran volumon 320-paĝan oni povas

antaŭmendi je favora prezo de nur 9 gld. (36 steloj)

MENDU HODIAŬ ĈE UEA!

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:	Administracio:
7, Av. Léon-Gourdault	5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine)	Nice (A-M)
Francujo.	

ĈU VI ESTAS STUDENTO ?

Se jes, vi volonte ricevos ekzempleron de „Mondaj Studentaj Novaĵoj”, ilustrita revuo eldonata de la Internacia Studenta Unuiĝo kaj verkata de studentaj kontribuantoj tra la tuta mondo. Tiu revuo, eldonata en lingvoj angla, franca, hispana, germana, araba kaj rusa, reprezentas forumon por la tutmonda studentaro, donas regulajn informojn pri studentaj aktivecoj kaj internaciaj kaj lokaj studentaj problemoj, debatoj kaj diskutoj, artverkojn, novelojn, ktp.

Ĝi starigas tutmondajn kulturajn konkursojn, aperigas suplementojn pri skribamikoj, kaj ĝenerale celas proksimigi ĉiujn, kiuj studas ĉe universitatoj, liceoj aŭ gimnazioj.

La kosto de abono estas tre modera. Skribu hodiaŭ por senpaga specimena ekzemplero (indiku la lingvon) kaj por detaloj pri abonado —

WORLD STUDENT NEWS,

Vocelova 3, Prague 2, Ĉeĥoslovakio.

LIBROJ EL JAPANUJO

- **Rakontoj de Velkinta Folio.** La liro de Vaselj Eroŝenko, blinda poeto. 40 p. \$ 0.18.
- **50 Fabloj de Ezopo.** La malnova sed eterne nova Ezopo, rerakontita de Nakagasi, K. 32 p. \$ 0.15.
- **En Ĉinio Batalanta.** Aŭtobiografia romano de japana esperantistino, sin ĵetinta en la tendaron de l'ĉina rezistmilito. 106 p. \$ 0.45.
- **Kanto de l'Koro.** Poemoj el japana, rusa kaj usona, tradukitaj de Mijamoto M. \$ 0.25.
- **La teksto dua.** Mezgrada teksto kompilita el diversaj materialoj. 30 p. \$ 0.10.
- **Turo por fali.** Poemoj kaj tri prozaĵoj de Vaselj Eroŝenko. \$ 0.18.
- **La polvo de l' morto.** La akcidento de Bikini kaj post tio. 46 p. \$ 0.25.
- **Kun la kadavro de l'edzino.** Travivaĵo en Hiroŝima, kun 8-paĝa ilustraĵo de Akamacu kaj Maruki. 52 p. \$ 0.40.
- **Hiroŝima.** Fotoj. 16 p. \$ 0.10.
- **Edelvejso.** Poemaro de Nisimura, M. 213 p. \$ 1.25.
- **Gauche la ĉelisto.** Scenario por pupa teatro. 41 p. \$ 0.25.
- **Prometeo.** Sendependa trimonata gazeto, Jarabono \$ 1.00.

MENDU ĈE UEA

aŭ rekte de

Japana Esperanta Librokooperativo
Nakacu-hamadoori 2-20, Ojodu-ku, Osaka, Japanujo.